

Praha-ek-1957-47-01

BULTENO PRAHA 47 1957

- 01 -

No 47

Majo – Junio 1957

Aperas laŭbezone

ESPERANTISTA SOMERO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Estas jam en Ĉeĥoslovakio bela tradicio aranĝi kursojn de Internacia lingvo somere – meze de floranta naturo, proksime de lagoj aŭ riveroj, en arbaroj, en medio, kiu kunigas refreŝigon de homo kun ebleco akiri novajn sciojn. Ne mire, ke ĉeĥoj kaj slovakoj, du frataj popoloj, denature pacamaj, nun pli kaj pli denove dediĉas sian atenton al ideo de la Internacia lingvo kaj eluzas siajn eblecojn por lerni la lingvon, kiu eminentemente forigas ĉiujn barojn, kiuj homojn dividas, kaj perfekte solvas la problemon de homa interkompreniĝo.

Tial ankaŭ nunjare ĉeĥoslovakaj esperantistoj donas eblecon al ĉiu interesulo elekti lokon kaj medion laŭ propra plaĉo kaj rekomendas laŭeble plej fruan aliĝon, ĉar malfrua aliĝo facile povus signifi aliĝfiaskon pro ĝenerale granda intereso.

DOKSY ĉe belega lago de Mácha – Somera Kolegio de Esperanto en la tagoj 14.7. – 28.7. Jam la 11-an jaron. Kategorioj A, B, C. Informojn kaj aliĝojn: Somera Kolegio de Esperanto, Doksy.

Aliĝtempo 30. 6. Fervojobato 50%.

KONĚŠÍN en valo de rivero Jihlava – Somera Esperanto-Tendaro en la tagoj 21.7. – 4.8., kursoj A, B. En la tagoj 5.8. – 17.8. kursoj A, B, C. Informojn kaj aliĝojn: Bl. Daňhelová, Pražská 496, Třebíč II.

Aliĝtempo 7. 7. Fervojobato 50%.

POPELNÁ apud Stachy (Ŝumavio) – Somera Esperanto-Tendaro en la tagoj 14.7. – 28.7. Kategorioj: komencantoj – E.instruistoj. Prospektojn kaj aliĝojn: Libor Křivánek, Zborovská 1332, Písek.

PŘÍBOR en bela nordorienta Moravio – Tria somerkursaro por komencantoj kaj progresintoj en la tagoj 14.7. – 28.7. Demandoj kaj aliĝojn: Ant. Satték, instr. Dvořákova 744, Příbor.

TKKE Estraro

Praha-ek-1957-47-02

BULTENO PRAHA 47 1957

- 02 -

Esperantista klubo en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha 2, Ve Smečkách 26 je la 20-a horo. De la 19-a horo perfektiga kurso gvidata de s-ano A. Slanina. Junularo de la klubo kunvenas ĉiumarde en Praha 2, Krakovská 21, III-a etaĝo je la 19-a horo.

Programo por majo-junio:

Finprelegoj de POPOLA UNIVERSITATO HONORE AL L. L. ZAMENHOF.

- 8.5. Štěpán UBRAN (Praha): Aventuroj de la Spirito
- 15.5. Ĉiuspecaj aktualaĵoj – libera tribuno de klubanoj.
- 22.5. Eduard V. TVAROŽEK (Martin): Miaj sperto el edukado de mia filo kiel denaska esperantisto.
- 29.5. PhDr Jaromír JERMÁŘ (Praha): Kelkaj problemoj de la moderna filozofio.

- 5.6. Jiřina HOLÁ (Praha): Kun farbo kaj peniko en la naturo (rememoroj el la vivo de signantoj de turistoj).
- 12.6. JUDr Vladimír MOHAPL (Olomouc): Proleta internaciismo kaj la problemoj de internacia lingvo.
- 19.6. Vuk ECHTNER (Praha): J. A. Komenský: Fermo de I-a parto de la Popola Universitato.

LA DRAMO „NORA“ DE HENRIK IBSEN EN ESPERANTO.

La teatro-grupo de la Praha Esperanto-klubo, la fama „Verda Ĉaro de Julio Baghy“, progresas ŝtupon post ŝtupo al ĉiam pli alta nivelo de sia arto. Ĝi jam delonge ne kontentiĝas per unuopaj scenoj kaj deklamaĵoj, nek per unuaktaĵoj, nek per scenserioj el famaj dramoj (kia estis la „Patrino“ de Karel Ĉapek), aŭ per teatraĵoj reduktitaj konforme al la limigitaj rimedoj de malgranda scenejo kaj ensemblo sen statistoj (kia estis „Maryša“ de fratoj Mrštík, ludita la 11. Apr. 1956), sed ili jam aŭdace atakas tutvesperajn teatraĵojn. La unua ludo de tia speco estis la konversacia komedio de G. B. Shaw „Pygmalion“ (ludita 4. Jun. 1956). La granda sukceso de la du laste nomitaj entreprenoj instigis la ensemblon de la Verda Ĉaro etendi la manon al fruktos ĉe pli alte pendantaj. Ili do elektis ĉi-foje la societatan dramon de Henrik Ibsen „NORA“. Ĝi estis prezentata en „Malá Scéna“ en Praha II la 20-an de Aprilo 1957.

Tiu ĉi dramo, skribita jam antaŭ pli ol du generacioj, fariĝis mondfama kaj la rolo de edzino, kiu vekigis el dolĉa sonĝo de falsa familia feliĉo kaj trovas en si forton interrompi ĉiujn rilatojn al sia edzo kaj infanoj, fariĝis parada rolo de multaj aktorinoj en profesiaj kaj amatoraj teatroj de la tuta mondo. La dramo mem malkvietigis siatempe la publikan opinion. Estis multe diskutanta la demando, ĉu Nora agis prudente, forlasante sian familion, aŭ ĉu ne estis por ŝi alia morala kaj societa eliro el la situacio. Tamen estas evidente, ke Ibsen intencis havi Noran tia, kia ni ŝin ekkonas sur la scenejo, sekvante paŝon post paŝo la tragikajn ombrojn, kiuj nehaltigeble densiĝas kaj kuŝiĝas sur la ŝajna feliĉo de burĝa kontenta familio. Nora, dorlotata de sia edzo, ĉirkaŭata per burĝa komforto meze de siaj amindaj infanoj, subite troviĝas en giro de rapidaj okazaĵoj, avizantaj katastrofon. Malkaŝiĝas, ke ŝi antaŭ jaroj en plej bona intenco ebligi al sia mortmalsana edzo vojaĝon en Italion, por savi lian vivon, falsis subskribon de sia patro. Nun ŝi fariĝas viktimo de ĉantaĝado. Ŝi atendas kiel memkompreneblaĵon, ke ŝia amata edzo, por kies savo ŝi tion faris, staros ĉe ŝia flanko, kaj ŝi estis decidita tiuokaze repurigi la reputacion de la familio per sinmortigo. Sed okazis io tute alia. Ŝia edzo ŝin superŝutas per riproĉoj kaj ofendoj, ĉar lia societa posteno estas endanĝerigita per minacanta skandalo. Tiam malfermiĝas la okuloj de Nora: ŝi ekkonscias, ke ŝi vivis en mondo de falso, ke ŝi estis por sia edzo nur ludilo kaj ornamaĵo de lia hejmo, sed neniel egalrajta vivkunulino. Kiam poste la danĝero de la skandalo tamen forpasas, ŝia edzo, Dro Helmer, kun senkompare grandsinjora gesto „pardonas“ al ŝi ŝian senpripensan agon, opiniante, ke de nun ĉio reestos en la familio kiel antaŭe.

Praha-ek-1957-47-03

BULTENO PRAHA 47 1957

- 03 -

Sed Nora jam travivas sian krizon kaj spiritan renaskiĝon. Ŝi decidiĝas foriri el la hejmo en laborplenan kaj suferigan vivon de memstara virino.

Tiuj preskaŭ 80 jaroj, kiuj forpasis ekde la tempo, kiam Ibsen verkis sian dramon, multon ŝanĝis en la rilato de viro kaj virino. La hodiaŭa virino ne estas plu pupo de sia viro (eble alilande estas alie?); sed tamen valoras rerigardi...

La dramon tradukis Eva Suchardová – Seemannová, kiu ankaŭ mem kreis la rolon de Nora kun profunda trasantento, atingante per sobraj rimedoj plej altan artefikon. De sceno al sceno kreskis la

streĉo, kiam ŝi plu ludis antaŭ sia edzo la rolon de senzorga, aminda edzineto, sed interne ŝi baraktis, skuate de angoro, espero kaj malfeliĉo. La lastaj scenoj, en kiuj la dramo kulminas kaj Nora la unuan fojon ekkonas la falsech de la societa formala moralo kaj la senmezuran egoismon de sia edzo, kaj kiam ŝi malkaŝis al li sian decidon, estis spirhaltigaj.

La duan ĉefan rolon, tiun de advokato Krogstad, ludis Antoni Seemann, kiu ankaŭ per sperta mano reĝisoris la teatraĵon. Li kreis figuron de homo, kiu pro iama kulpo perdis sian pozicion en la societo, kaj ĉiurimede, eĉ helpe de ĉantaĝado, volas reakci sian reputacion.

Sinjorino Lind (Eva Řiháčková), mikino de Nora, estis bele prezentata en rolo de multe suferinta virino, iu kare elaĉetis sian prudenton kaj mensan sobrecon. La sceno, en kiu ŝi proponas edzecon al Krogstad, sia iama amato, estis tre konvinka, tiel ke la peripetio, la ŝanĝo de la dram-linio, impresis tute nature. Doktoron Rank, la malnovan amikon de familio Helmer, kiu bone sciis pri perena malsano, mordanta en lia korpo, kaj senpatose foriras el la vivo, donante per sia stoika sinteno kvazaŭ moralan subtenon al la decido de Nora, ludis taktoplene Pavel Tichý. La malfacilan rolon de doktoro Helmer, la edzo de Nora, prezentis zorge kaj atente Mirek Kalivoda.

Kaj ni ne rajtas forgesi ankaŭ la epizodajn rolojn de servistino Helena kaj vartistino Anna-Maria, kiujn tre plaĉe kaj simpatie kreis Eliška Drapáková kaj Arnoštka Nývltová, kaj ankaŭ ne la tri amindajn infanojn de Nora, kiuj kun plena certeco kaj memkomprenebla vigleco moviĝadis sur la scenejo. La ludo estis prezentata sen ia ajn mallongigo kaj – kio estas tute kutima ĉe la Verda Ĉaro – sen sufloro, kaj ĝi rapide progresis sen stumbloj, en perfekta parkerado de la roloj, dum tutaj tri horoj.

La spektantoj, kiuj kunvenis – eluzante samtempe la Paskan labor-konferencon de la esperantistoj el la Praga regiono – el 22 lokoj de Bohemio kaj Moravio, plenigis la halon de Malá Scéna kaj entuziasme aplaudis al la plezurplena artvespero. Estis inter ili ankaŭ Bulgarino, Polino kaj Nederlandano, kvazaŭ simbole reprezentante la veran internacian publikon, por kiu la Verda Ĉaro kulturas sian arton.

La grandan artan sukceson de tiu ĉi vespero rekonis ankaŭ la oficialaj gastoj kaj flate esprimis sian opinion. Estis oficisto de la Ministerio de l' Instruado (k-do Benda) kaj reprezentante de l' Centro de la Popola Kreado (k-do Jan Martinek).

La Verda Ĉaro intencas ripeti la ludon ankoraŭfoje jak prezenti ĝin en la kadro de la Konkurso de la Popola Kreado.

Pu.

LABORKONFERENCO DE ESPERANTISTOJ DE LA REGIONO PRAHA.

En la kadro de paska seminario, en kies programon kontribuis pluraj talentaj oratoroj, kiel ĉefa aranĝo estis la laborkonferenco la 21-an de aprilo. Krom kvardeko da interesuloj el la ĉefurbo partoprenis ĝin reprezentantoj el Ostrava, České Budějovice, Poděbrady, Plasy, Olomouc, Poruba, Nové Město nad Metují, Jihlava, Plzeň, Pernštejn n. O., Děčín, Rýmařov, Svitavy, Hořice v Podkrk., Kutná Hora, Kladno, Velký Osek, Doksy, Hradec Králové, Jablonec n. N., Tábor. En ampleksan programon, kiun per bonvenigo malfermis la Kluba prezidanto Jar. Šustr, sinsekve kontribuis TKKE-komitatoj: Josef Vítek, Rudolf Burda, Josef Kožený, Jaroslav Šustr, Dro Tomáš Pumpr, Dro Jaromír Jermář, Jaroslav Mařík kaj Vuk Echtner, kiu informis pri faritaj kaj planataj laboroj de siaj sekcioj krom la raporto pri la ĝenerala situacio de la movado enlande kaj en la mondo fare de Josef Vítek.

Post la ampleksa letero al la membro de ĉeĥoslovaka registaro k-do Václav Kopecký kaj al ceteraj registaraj kaj partiaj gvidantoj, la ministerio de l'intstruado ricevis taskon prilabori dokumenton pri nuna stato de la movado en nia ŝtato. La dokumento estas bazo por repermiso de la movado kaj por ĝies reorganizo. La ministerio klopodas reakiri la permeson de la movado (la malpermeso de la jaro 1952 ne estis ankoraŭ nuligita, kvankam la movado estas ĝis nun sen tutŝtata organizo tolerata), ĉar nur tiel povos esti sendita ĉs. oficiala delegitara al Marseilloe, kion vidas la ministerio nepre grava. La prezidanto de TKKE konstatis, ke iom post iom ni marŝas antaŭen. Multiĝas priesperantaj raportoj en la preso, multiĝas preparuj signoj por la renaskita movado. Sed Vítek donas al ĉiuj ankaŭ gravan demandon: ĉu ni – esperantistoj – mem estas bone preparitaj por honeste kaj bonkvalite superregi la estontajn taskojn. Ĉu ni havas sufiĉe da kvalitaj instruistoj, da organizakapablaj laborantoj en la tereno, t. e. en provincaj lokoj, kie tre ofte la movado lamas aŭ tute stalas. Perspektivo de glora estonteco por nia movado devigas nin esti preparitaj. Ĉeĥoslovakio pro la tutmonda paco kaj harmonio **devas** reakiri gvidantan lokon en la tutmonda movado! Ni estu preparitaj je taskoj, kiuj nin atendas! – Ĝojdona estis ankaŭ la konstanto de Vítek, ke forestas la tempo de disharmonio inter diversaj partoj de la movado en Ĉeĥoslovakio. Diversaj agadmanieroj la movadon nur kaj nur hardigis. Nun Ĉeĥoslovakio havas unu fortan nevenkeblan movadon, havas bone funkciantan junan generacion, kiu sin honeste preparas transpreni gvidantan rolon en la peresperanta porpaca movado en Ĉeĥoslovakio. – Prave diversloko opinias niaj samideanoj, ke malmulton TKKE faris, ke nevideblaj estas la sukcesoj. Jes, certe, la sukcesoj neniel respondas al niaj deziroj, sepiroj, al niaj eblecoj. Sed, vi ĉiuj, ankaŭ vi izoluloj en malgrandaj vilaĝoj, vi estu certaj, ke ni faras ĉion, kion permesas niaj forte, sed, ke ni havas ankaŭ elĉerpigajn profesiojn, familiojn, ke niaj malgrandaj infanoj bezonas la edukgvidon de siaj partoj... kaj ke ni „kuiras sole el akvo“, sen monrimedoj, nur el bonvolaj donacoj de nia vasta samideanaro. Ni forgesos **nenion**, kio povas helpi la restarigon de la movado! S-ano Burda proponas rezolucin, kiu entenas starpunkton de ĉs. esperantistaro rilate fiuzon de atom- kaj hiro enbomboj, noblan sintenon de okcidentgermanaj kaj cetermondaj scienculoj kaj daŭran preton de ĉs. esperantistaro servi senrezervo ale vera paco kaj monda harmonio. – La rezolucio estis sendiskute kuna klamo akceptita kaj nome de TKKE forsendita al ĉs. registaro. Pacorganize ne Ĉeĥoslovakio, ĉs. presagentejo, radio kaj televidoficejo ĉeĥoslovaka. Sekvan parton de la konferenco plenumis kontribuoj de diverslokaj reprezentantoj, kie instigoj, raportoj kaj sciigoj celis plifirmigon de nia movado. La konferenco finita per komuna kanto de „La Espero“ postlasis fortan senton de bone farita ĝisnuna laboro kaj de nevana klopodado de ĉs. esperantistaro.

-jelĉ-

- - -

Antaŭ pli ol kvar jaroj ni komencis eldonadi nian Bultenon. Orfigita esperantistaro ĝin bezonis. Ne estas ankaŭ nun sengrava, se ni ripetos profetajn vortojn de la Majstro, kiujn ni uzis komencanto la eldonadon:

„Longe daŭros ankoraŭ mallma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj... Kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj a lunu vero, al unu feliĉo.“

L. L. Zamenhof 1907

Kvindek jaroj pasis... kaj denove homoj – lupoj celas endanĝerigi la homaron por nepripensebla suferado kaj verŝi noktan mallumon sur ĉion, kio servas por la bono de homaro. Lidice, Oswieciom, Buchenwald, Belsen, Hiroŝima, Nagasaki kaj mil aliaj nomoj estas akre vivaj por povi forgesi ilin. Deko jda milionoj da senkompate mortigitaj viktimoj, infanoj de tutmondo, vidvinoj, militkripligitaj kaj urbruinoj vokas: „Homoj, ne forgesu!“

GEEDZIĜOJ:

S-anino Vlasta CHMELÍKOVÁ, konata al multaj el ni el SKE Doksy, edziniĝis jam la 31-an de decembro 1956 kaj nomiĝas nun Vlasta Lexová. Novgeedzoj loĝas en České Budějovice. Multan feliĉon en nova komuna vivo!

--

PROMOCIO:

Estinta ĉefdelegito de Esperanto-junularo en ĈSR Inĝ. Jan WERNER el Lanškroun estis la 25-an de majo 1957 en Brno publike promociita je inĝeniero arkitekto. Ni kore gratulas!

JUBILEOJ:

La 15-an de februaro 1957 festis sian 65-jariĝon meritplena slovaka esperantisto, komitatano de TKKE J. Valaštan Dolinský. Longa estas la listo de liaj literaturaj kaj ceteraj esper.verkoj. Li longe vivu en plena sano kaj kontento!

ANĈI BÁROCHOVÁ. Silente, modeste, kvazaŭ nenio estus okazinta, kasistino de Esperantista Klubo en Praha Anči Bárachová, jubileas en sia funkcio. Antaŭ plenaj 20 jaroj transprenis ŝi tiun ĉi sian honorofican, gravan kluban postenon kaj de tiu tempo ĉiam zorgeme, akurate kaj modele plenumadis ĉion, kio apartenas al ŝiaj tasko kaj kompetenteco. Ŝia laboro ne estis facila. Nia Klubo neniam estis riĉa! Kaj da mono ĝi ĉiam bezonis tre multe. Ŝi neniam protestis, kiam la komitato en la intereso grave subteni la movadon elĉerpis kluban kason preskaŭ ĝis fundo. Sed ŝi sciis ankaŭ kun plej senkulpa vizaĝo prezenti fiktivan bilancon, el iu vidiĝis, ke nenio postrestas – kiam raba mano de gestapanoj ordonis fine de 44a jaro kluban likvidacion, kaj transdonon de ĝia havaĵo. – Tiam ŝi savis ĉiun monon – por la tempo kiam ni povos ree komenci! Kaj ŝi ne longe devis bendi. Samideanino Bárachová fariĝis kluba kasistino post kvinjara funkciado en komitato kluba. Ŝi do nun jubileas ankaŭ kiel agenta komitatanino, kiu plenan kvaronjarcenton estas en nia Klubo aktiva. Fine ni devas malsekretigi, ke la 28-an de aprilo 1957 pasis plenaj 35 jaroj de la tago, kiam s-anino Bárachová, tiutempe fraŭlino Anči Nývltová aliĝis al Esperantista Klubo en Praha kaj fariĝis ĝia membrano. Jen vere jubileoj, pri kiuj ni parolu, pri kiuj ni skribu, kiujn ni diskontu, ĉar tiuj jubileoj donas al ni okazon, por varme premi ŝiajn manojn, kaj elkore danki, por ŝia senprofite oferta longjara laboro kaj fideleco. Ke samideanino Anči Bárachová ankoraŭ longajn jarojn administruj niajn financojn, kaj en plenaj sano, plezuro kaj kontenteco ŝi ĝoju el fruktos de siaj poresperanta kaj kluba laboruj ni certe ĉiuj al ŝi deziras.

ŠUSTR

--

LETERO AL MIA INSTRUISTO.

(Dolfa BARTOŠÍK – 1. 5. 1957 – kvindekjara)

Kara Dolfa,

senbrue, trankvile, milde, en persista laboro pasas jaroj. Kaj jen vis taras antaŭ la tago, en kiu vi festos kvindekan datrevenon de via naskiĝo. Centoj kaj miloj da fidelaj amikoj rememoras vin en ĉi tiuj tagoj kun sentoj de dankemo.

Ankaŭ mi, unu el viaj sennombraj disĉiploj de esperanto, rerigardas nun admirindan filmon de via vivo...

Denove mi vidas la junan instruiston, kiu partopreninte Universala Kongreson en Krakovo prelegis pri ĝi en distrikta kunveno de instruistoj en Uherské Hradiště kaj kies entuziasmaj kaj entuziasmigaj vortoj efikis, ke tuj post la prelego oni aranĝis kurson de esperanto por geinstruistoj...

Mi denove vidas vian respektindan propagandan laboron en Moravia Slovakio: multaj prelegoj, paroladoj, kursoj, fondo de E-klubo, rondetoj, invitado de konataj E-vojaĝantoj (J. R. Scherer kaj aliaj) – ĝi estis via merito, ke via spatra regiono fariĝis iom post iom verda...

Mi ree travivas tiun epokon de via vivo, kiam fi forveturadis en fremdajn landojn kaj tie batalis por esperanto kiel Csech-metoda instruisto. Jugoslavio kaj Nederlando – jen du gravaj haltigoj en via vivo. Neniu miraklo, ke el tiu lasta lando vi alveturigis hejmen barman holandan edzinon-esperantistinon, ĉar esperanton vi ne nur propagandis, sed vi por ĝi kaj per ĝi ankaŭ vivis...

En filmo de via vivo defilas antaŭ miaj okuloj multaj E-gazetoj, ĵurnaloj kaj revuoj kun artikoloj de vi: Ligilo, Progreso, Heroldo de Esperanto, La Praktiko, Esperanto, Literatura Mondo kaj longa serio kaj aliaj...

Kiom da vitrionoj aŭ montrofenestroj oni povus plenplenigi nur per viaj desegnaĵoj, ilustraĵoj, ex libris-oj, esperantaj afiŝoj, proponoj sur E-glumarkoj (aperos en junio-rim.de la redakcio), kaj vidaĵkartoj (aperos en junio-rim.de la redakcio), lignogravuraĵoj kaj aliaj altvaloraj artaj verkoj, sur kiuj ĉiam la verda stelo montris al la homaro ĝustan vojon...!

La filmo de via vivo kuras, kuregas antaŭ miaj okuloj kaj ĉiu parto de ĝi montras vian laboron. Sed la filmo rakontas ankaŭ pri la homo. Pri la aŭtoro de ĉi tiu impona laboro. Ĝi rakontas pri lia modesteco kaj nobla delikateco. Pri lia fideleco al amikoj, pri lia preteco kiam ajn helpadi ilin. Pri lia granita fido, ke la ideo de Internacia lingvo – la afero de nura logika pripensado – devos venki ...

Jes, kara Dolfa, riĉa kaj interesa kaj instrua estas la filmo de via vivo. Se mi posedus elsendan televidan maraton, mi tre ŝatus projekcii la filmon pri vi por viaj amikoj, dissemitaj en ĉiuj kontinentoj. Ili certe ĝoje konstatuj, ke ilia kvindekjara Dolfa Bartošík (Fa-Ba) laboras por esperanto kun la sama entuziasmo kiel antaŭ dudek aŭ tridek jaroj, ke lia koro batas same varme kiel en la tempo, kiam ili havis feliĉon renkontadi lin, ke –

Sed mi ne volas kolerigi vin, ara Dolfa, pro tio mi finas. Mi ja intencis nur diri al vi en la nomo de ĉiuj gesamideanoj, kiuj estis gajnitaj por esperanto de vi, ke ni dankas al nia modela instruisto por ĉio bona, per kio li pliriĉigis kaj plibeligis niajn vivojn, kaj ke ni deziras al li en la dua duono de lia vivo fortan sanon.

Sincere via

F. Omelka

--

70 jarojn de sia vivo atingis la 11-an de majo nia membro s-ano Nikolao BOČEK. Li do estas samaĝa kiel nia Internacia lingvo. Ni sendas al nia membro elkorajn salutojn kaj bondezirojn de danaj sano kaj kontenteco.

--

Vivu FRANTIŠEK BLÁHA!

Literární noviny alportas en sia 8-a nro de 23-a de februaro laŭdegan ĉefartikolon de Milan Schulz pri la emitenta agado de la Uzina klubo de Gottwaldov kaj pri ĝia ĉefa kultura laboranto, instruisto František Bláha. La artikolo akcentas lian tute eksterordinaran meriton pri muzika eduko de la junularo en tiu grava industria loko. – Ni estas feliĉaj, ke instruisto Bláha, sur kiun tiuj ĉi grandegaj laŭdoj estas ŝutataj, estas malnova kaj ĉiam aktiva esperantisto kaj ni kore gratulas lin. Ni ne povas el Praha juni, ĉu la interesa ekspozicio de filatelaĵoj el Britujo kaj Japanujo, kiun mencias la sama artikolo, ne estas laboro de loka Esperanto-grupo.

O. G.

--

MORTO:

En Kladno mortis la 6-an de majo 1957 longjara esperantisto František STŘÍBRSKÝ en aĝo 75 jaroj. Al parencoj de la mortinta samideano ni esprimas profundan kunsenton. --

En Ostrava mortis la 15-an de aprilo en aĝo de 78 jaroj aktiva samideano Josef MLÝNEK. Homo de ĉiuj ŝatata, ĉiam preta subteni la movadon forlasis nin. Ĉe la tombo adiaŭis lin s-anoj F. Lička kaj V. Slaný. Liaj parencoj akceptu nian sinceran kondolencon!

Atingis nin ankaŭ la sciigo, ke la 3-an de aprilo 1957 festis sian sepdekjariĝon esperantistino de 1914, muzikinstruistino Anna JARATOVÁ el Praha. Ankaŭ ŝi akceptu niajn bondezirojn!

Kaj kiu ne konus nian karan membrinon, ĉiam servopretan, modelan esperantistinon Božena VLČKOVÁ el Kladno? Ankaŭ ŝi plenĝena meze de sia pormovada laboro festas la 2-an de junio siajn sepdek jarojn. Sanon, vivkontenton, daŭran rideton kaj ĉion nur plej bonan deziras al ŝi sincere la klubanoj.

EL LA LETERO DE NIA MALPROKSIMA MEMBRO MARIE GINZOVÁ:

(daŭrigo)

Nia filino kaj bofilo frue matene foriras en laboron kaj posttagmeze ili revenas. Eva laboras en elektrejo de Haifa kiel teknika desegnistino kaj fabriko ŝin transporta sen la laboron kaj reen. Same okazas pri nia bofilo, kiu estas okupita en plej granda izraela fabrikejo de ĥemiaĵoj kaj de artefaritaj sterkaĵoj. Ĝenerale oni traktas ĉi tie la laborantojn tre bone. Sindikata organizo zorgas ĉiufanke pri laborantoj kaj estas potencega organizo, kiu netas eĉ kompletan grandan fabrikon neprosperantan, por ke laboristoj ne perdu laboron. Libertempoj estas proksimume la samaj kiel ĉe vi, sed se iu rajtas ricevi libertempon trisemajnan, li restas hejme 23 tagojn, ĉar oni kalkulas nur labortagojn. Se enestas festotagoj dum libertempo, ĝi estas avantaĝo. Ĉiu laboranto rajtas foriri al somera restadejo por difinita tempo kaj la koston de la restado pagas la labordonanto. Kiam la laboristo forlasas la laboron, li ricevas por ĉiu jaro, dum kiu li laboris en la entrepreno unumonatan salajron. Estas tute agrable ricevi ekz. post sestra laboro aldona duonjara salajron.

Ekzistas ĉi tie kompreneble socia asekuro, sed ŝajnas al mi, ke ĝi ne estas tiel favora kiel en Ĉeĥoslovakio. Precipe nun, kiam ĝi estis ĉe vi tiel forte plibonigita. Ĝenerale oni scias ĉi tie labori bone kaj rapide. Sciu ekzemplon pri la subtera fervojo de Haifa. Baldaŭ post nia veno okazis en Haifa ekspozicio. Tie estis stando de la urbo Haifa kaj tie estis granda plastika mapo, en kiu estis notitaj diversaj projektoj preparataj. Ankaŭ subtera fervojo, sed ni tiam ne tre kredit, ĉar ni memoras la historion de subtera fervojo en Praha. Jam antaŭ pluraj monatoj rimarkis tamen mia edzo foje en Haifa ian flage ornamitan lokon en mezo de la urbo kaj li eksciis, ke tie ĵus la urbestro s-ro Aba Kuši solene komencas per elektra fosilo boradon de la fervoja truo. Kaj hodiaŭ oni jam diligente boras en ses diversaj lokoj la malmolan rokon, sur kiu situl Haifa. Certe baldaŭ ni uzos tiun tramon. Same estis pri nova haveno en Haifa. Ĝi estis projekciita kaj dum nia ĉeesto en la lando en nekredeble mallonga tempo estis la grandaj konstruaĵoj en la maro finfaritaj, magazenoj kaj grup starigitaj kaj hodiaŭ alvenas jam amaso da ŝipoj en la novan, puran havenon. En Tel-Aviv estis dum tiu ĉi somero konstruitaj ĉe la maro grandaj novaj strandoj kun ĉiu komforto, kafejoj kaj dolĉakvaj bazenoj.

Oni provis ĉe ni kulturi kafon. Pasintjare estis la unua rikolto: 5 kilogramoj. Nunjare oni rikoltis jam 150 kg kaj la esplora instituto en Reĥovot liveras jam al ĉiu interesulo kafoplantojn por kulturado. Post tri jaroj portas la planto jam kafon kaj post iom da tempo oni havos da kafo sufiĉe por la loĝantaro. Kvankam plejparte sabla, la lando estas tre fruktodona kaj vi scias jam, ke multo estas ĉi tie rikoltata dufoje en la jaro. Tial oni devis haltigi la kulturadon de legomoj, da kiuj estas jam pli ol sufiĉe. Oni esperas, ke post ses jaroj oni rikoltos en la lando sufiĉe da ĉio por nutro de ĉiuj civitanoj. Ni havas niajn proprajn daktilojn, figojn, araŝidojn, bananojn kaj oni eksportas ĉion en ĉiam kreskantaj kvantoj. Mi ne parolas pri organĝoj kaj aliaj citrusaj fruktos, kiuj estas ĉefa eksportprodukto izraela. Por monata meza salajko oni povas aĉeti nun proksimume 2000 kg da organĝoj, sed nur 1000 kg da terpomoj. Tamen eĉ ili estos malpli kostaj, ĉar ankaŭ terpomoj estas rikoltataj dufoje en la jaro.

(daŭrigo)

NI RECENZAS, KOMENTAS, INFORMAS, LEGIS POR VI

RADIO-INTERVJUO KUN NIA KLUBA PREZIDANTO. El Hispanujo venis pluraj demandoj ale ĉeĥoslovaka radio, kial oni ankoraŭ ne elsendas la programojn en la Internacia lingvo, kvankam la estintaj programoj estis la plej ŝataj. Hispanlingva parolantino intervjuis do s-anon Jaroslav Ŝustr pri la stato de nia movado kaj la intervjuo estas elsendata sabate la 1-an de junio je la 21,30a horo kurtonde por Hispanujo. Demandoj en la hispana, respondoj en la Internacia lingvo.

--

LA RADIOSTACIO PRAHA II dissendas la 31-an de majo je la 16,40 horo kvar specimenojn el „Kalevipoeg“ en ĉeĥa traduko de samideano Miloš Lukáš. Unu specimen estas programata la 9-an de junio je la 20,30 horo ripete.

--

LA DRAMO DE DEKKER „LA MONDO NE HAVAS ATENDEJON“ SUR ĈEĤA SCENEJO.

La 13-an de aprilo 1957 prezentis la Teatro-klubo en Frenštát pod Radhoštěm „Divadlo a recitace“, konata sub la mallongigo DAR, la dramon de la nederlanda verkisto Maurits Dekker „La mondo ne havas atendejon“. La prezentado okazi sen la kadro de la Dua Festivalo de la Teatro-ensembloj el la regiono Ostrava, kaj por ni estas rimarkinde, ke ĝia ĉeĥa teksto estis tradukita el la esperanta prilaboro de F. Faulhaber. Ĉar ankoraŭ ne estas realita la ebleco transpagi al Nederlando la aŭtorpagon, Sro Dekker afable permesis ludi kelkan fojon sen pago de la honorario. Ankaŭ tiu ĉi traktado kun la aŭtoro okazis pere de Esperanto. La rolo de Esperanto en tiu ĉi afero estis menciita en la teatraj programoj. La prezentado estis tre sukcesa. La publiko balotin, kiu ludo al ĝi plej multe plaĉis el la tuta festivalo, kaj la dramo de Dekker ricevis la plej multajn voĉojn. La Frenštát-a ensemblo iras kun tiu ĉi teatraĵo en la duan rondon de la Nacia konkurso, kiu okazos en Krnov. – Fine ni menci, ke ĉi tiun dramon disaŭdigis jam trifoje ankaŭ en prilaboro laŭ la Esperanta teksto – la ĉeĥoslovaka radio.

Pu.

--

ĈU NI TROVOS pli grandan nombron (minimum tri mil) da eksterlandaj abonantoj por kvarpaĝa grandformata gazeto sur aerpoŝta papero, kiu aperus dufoje monate kaj raportus pri politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj eventoj en ĈSR? Anstataŭ abonpago ni akceptos rekompence (sed tio neniel devigas la abonantojn): 1) Esperantajn literaturaĵojn kaj gazetou, 2) nacilingvaj belartajn verkojn kaj gazetojn eĉ fakspecajn (teknikajn, sciencajn ktp.) kun manuskriptaj Esp-aj resumoj, 3) specimenojn de folkloro arto ĉiuspeca, eĉ publikaĵojn pri ĝi kun Esp-aj klarigoj, 4) porinfanajn ludilojn (prefere de nekomerca deveno), 5) objektojn valorajn por kolektantoj (PM, PKI, alumetvinjetojn, konkojn, plantojn ktp.). Rimarko: Mi akceptos, sed ne interŝanĝos! Skribu al: Jojko Staněk, ĵurnalisto, Osadní 45, Praha 7 – Holešovice, ĈSR.

--

Laŭ informo de finnlanda ĵurnalisto Niilo Kavenius tiea Esp-a movado inter junularo ne estas tro forta. Oni povus facile helpi per demandaj leteroj adresataj al Finnlanda Festivalo-centro, Helsinki, Bulevardo 13 A 9, Finnlando.

--

RUDÉ PRÁVO, centra presorgano de Komunista partio Ĉeĥoslovaka (nro 145 el dimanĉo 26.5.1957) raportas pri s-ano T. Kurisu el Tokio, liaj poresperantaj kaj peresperantaj laboruj kaj speciale pri liaj tradukoj el ĉeĥa literaturo en japanan lingvon. Favana, longa artikolo post pluraj silentoplenaj jaroj signas novajn perspektivojn por la movado en nia lando.

--

Kontraŭe OHNÍK (IX-a jarkolekto, nro 9, pĝ. 13) en la artikolo „Kial homoj parolas diversajn lingvojn“ malfavore taksas Esperanton, uzante „faktojn“, pri kiuj normale pensantaj homoj eĉ ne perdas vorton, ĉar temas pri sensencaĵoj. Trafe kaj vere saĝe respondis al la redakcio nia slovaka samideano Eugen Grich el Nižná Slaná.

--

KIU HAVAS HEJME INFERON – la faman tradukon de Kalocsay, en bela bindo, kun leda dorso, bonvolu ĝin resendi kiel registritan presaĵon al Ota Ginz (nuna adreso: Shd. Szold 11, Kirjat Jam Bet, Izraelo). Li forgesis, al kiu li ĝin pruntedonis.

--

UČITELSKÉ NOVINY (centra organo de ĉs. instruistaro, nro 22, 30 majo 1957) sur titolpaĝo enhavas artikolon „Internacia fratiĝo de junularo“, en kiu i. a. ĝoje ni legas pri sukcesoj de E-rondeto de la lernejo en Kopřivnice. La rondeton gvidas instruisto Ant. Satttek. Infanoj vigle korespondas kun multaj junaj geamikoj el diversaj landoj. Favora artikolo bonege proksimigas la Internacian lingvon al ĉs. instruistaro.

--

NE ĈIUJ ANTAŬMILITAJ ABONANTOJ jam scias, ke la Internacia Pedagogia Revuo, la organo de ĉiu instruisto kaj Esperanto-kursgvidanto, denove kaj regule aperas. Ĝi eldoniĝas en Toulouse (Francio) monate kaj ĉiu numero enhavas interesajn artikolojn pri instruaj kaj edukaj demandoj. Jamaj abonantoj, bonvolu atentigi pri la IPR viajn kolegojn. Jarabono Kĉs 10,-. Mendojn akceptas s-ano Th. Kilian, peranto por ĈSR, Příční 318, Třebíč.

--

SKRIBANTE AL VIAJ GEAMIKOJ ĉu enlandaj aŭ eksterlandaj, ne forgesu surglui sur la koverton belegan Esp. glumarkon. Somera Kolegio en Doksy eldonis ilin en diversaj koloroj. Unu serio, kvar koloroj, cent glumarkoj kostas Kĉs 6,-. Malgrandaj rememorfolioj po 6 glumarkoj bulaj nerandumitaj kaj verdaj randumitaj kaj ne randumitaj. La rememorfolioj kostas po Kĉs 0,50. Mendu ilin ĉe Fr. Pytloun, Jungmannova 29/I, Poděbrady.

--

LA PROGRESANTO – marta numero, pĝ 23a: Notoj pri Historio kaj Movado.
(ni citas): Ni trovis s-inon Julie Šupichová, fakan instruistinon en Praha, Ĉeĥoslovakio, kiu dum multaj jaroj prizorgis la sciigojn pri nia movado en la ĉeĥoslovaka gazetaro, preta kunlabori en ĉi tiu rubriko. La redakcia komitato kore bonvenigas ŝin!

--

EN KIO ESTAS LA ESTONTECO DE ESPERANTO? (En la n-ro 9-10, j. 1948, pĝ. 91, mi trovis en artikolo „Internaciaj esperantistaj kongresoj 1948“ post raporto pri SAT-kongreso (fine de artikolo, jenajn, kvazaŭ profetajn vortojn de unu el la plej grandaj spertuloj pri la E-movado Dro S. Kamarýt:) „Tamen la estonteco de Esp-o estas en cerboj de la „neŭtraluloj“. Ili malpli dependas de teorioj kaj pli de sperto. Tial ili aspektas pli senkoloraj. Sed tio ja estas signo de ĉiu laboro: Ĝi estas farata en laborvesto. Sole la fruktoj de la laboro estas brilantaj.“ S. K.

Jm.

--

ESPERANTO EN „WORLD STUDENT NEWS“. La Internacia Unio de Studentoj /IUS/ en Praha ricevas sufiĉe ofte korespondaĵojn en Esperanto. IUS nun komisiis membron de nia klubo (junularo) altlernejanon Zd. Čapek, verki kurson de Esperanto por la internacia studenta gazeto. Ĝi aperos poparte en ĉiuj ok lingvoj, en kiuj „World Student News“ estas eldonata.

Jm.

--

MARJORIE BOULTON, la famiĝanta Esperanta poetino, skribis al ni pri sia granda ĝojo pro la surscenigo de ŝia drameto „Ĉe l'akvoj de forgeso“ fare de „Verda Ĉaro de J. B.“. Loka angla gazeto aperigis mencion pri la prezentado en Praha. „Mi ankaŭ tre dankas pro la sendado de la ĉeĥa bulteno. Hej, mi komencos baldaŭ senti ke mi estas renoma!“ En junio, drameto estas prezentata dum regiona esp. konferenco en norda Anglujo.

Jm.

--

TRIA INTERNACIA KURSO PRI ESPERANTO KAJ GEONISMO (20-27 julio 1957) en Münchenwiler apud Murten-Morat, Svislando estas propagandata per bela 4-paĝa prospekto kun du ilustraĵoj de la regiono. Organizantoj: Svisa Esper. Societo kaj Svisa Esper. Instituto. Kursgvidanto: Dro William Perrenoud, Fbg Gare 13, Neuchâtel.

LP

--

DANLANDO (Kopenhago kaj Nordselando) belega trikolora faldprospekto en perfekta lingvaĵo donas plej utilajn informojn por vizitantoj. Vera modelo nepre sekvida!

--

Esperantista Klubo en Liberec komencis la eldonadon de neregula informilo NIA VOJO, informanta en ĉeĥa lingvo pri ĉiuj aktualaĵoj.

--

Praha-ek-1957-47-10

BULTENO PRAHA 47 1957

- 10 -

UNIVERSALA REVUO, aperanta laŭdire 5-an jaron en Francujo. Ni vere ne volas tion kredi, kvankam pluraj ĉeĥoslovakaj esperantistoj ricevis tiun ĉi „reforman revuon“ – oktobro 1956, n-ro 8. La anonima reformanto de la Internacia lingvo forgesas, ke ĉeĥoslovakaj esperantistoj jam transvivis plurajn „reformantojn“ kaj Esperanto en Ĉeĥoslovakio restos netuŝita per similaj malsanaj proponoj. La eldonanto oferu monon por pli utilaj celoj!

Josef Vitek, prezidanto de TKKE

--

En aprilo aperis la jam anoncita unua numero de nova TEĴA-organo, nomita simple „Bulteno“. Ties promesata pli regula nerado, minimum ĉiumonate, certe helpos plivigli laboron de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, membriganta profesiajn kaj amatorajn ĵurnalistojn kaj publicistojn. Redakteja adreso de „Bulteno“ estas: Ivan Keremodĉiev, bd. Hristo Botev 98, Sofia II, Bulgarujo.

stk

--

Pasinta deka numero de litova gazteo „TARYBINĖ MOTERIS“ (Sovetunia Virino) enpresis rakonton de Jiří Marek „Parolas patrino“ el iama „Esperanto-Servo“, tradukitan nacilingvan pere de Stasys Kazlauskas.

stk

--

Nur nun ni hazarde malkovris en Vrchlabí-Muzeo leteron datitan la unuan de januaro 1912 en Kovansko, per kiu iu Fr. Hájek rekomendas al ne pli detale nomita teksaĵa uzino uzi nian Esp-an stelon kiel ornamaĵon sur naz-, buŝ-, tablotukoj kaj litkovriloj. Por ĉijara UK en Marseille aŭ Junulara festivalo en Moskvo estas jam malfrue efektiviĝi ĉi-ideon, sed eble je iu alia oportuna okazo.

stk

--

NOVAJ LIBROJ: „LA VAGADO SUB PALMOJ“. Antaŭ iom pli ol unu jaro ni legadis ĉiumonate en la revuo Esperanto streĉajn rakontojn de Jean Ribillard pri liaj travivaĵoj en Sahara, kie li pasigis multajn tempojn kiel oficiro de la franca armeo. Tiuj fejetone skribitaj artikoloj, plenaj de franca sprito kaj akompanataj de multaj fotografaĵoj, estas nun eldonitaj libroforme, faro de la Eldona Fako de la UEA. La libro havas 56 paĝojn sur luksa papero kaj estas havinda laŭ sia eksteraĵo same kiel laŭ sia interesa, amuza enhavo kaj agrabla, riĉa esperanto. La prezo ne estas indikita.

Pu.

--

Ni certe vendus kelkajn centojn de ĉitiu bela libreto, se ni povus importi ĝin. Ni petas niajn legantojn ke ili ne direktu siajn mendojn al ni.

Redakcio de la Bulteno

--

NOVA BEZRUČ-POEMO EN JAPANA LINGVO. La grandan poemon „Mi“ de Petr Bezruč tradukis laŭ Esperanto-teksto. M. Sakai kaj publikigis ĝin en la literatura revuo Gendai-Ŝi, aperanta en Tokio. Jam

antaŭe aperis kelkaj poemoj de Bezruč, tradukitaj de Tugu Kurisu. Ankaŭ li uzis kiel bazon Esperanto-tekstojn al li liveritajn.

O. G.

--

ESPERANTO-STRATO en KNITTELFELD (Aŭstrio) laŭ sciigo de Aŭstria Esperanto Federacio estos inaŭgurita la 7-an kaj 8-an de septembro 1957 kunlige kun Esperantofesto okaze de 70jara ekzisto de la mondlingvo.

Rib.

MILANO – plurkolora belega faldprospekto kun detala urboplano en bona lingvo informas detale pri tiu ĉi bela itala grandurbo. Senpage ricevebla de Ente Provinciale per il Turismo, Milano, Via Caserotte 3, Italujo.

--

LONDONA „DAILY WORKER“, organo de brita komunista partio, enpresis la 3-an de majo artikolo pere de Arthur Nobes kun multsignifa titolo „Lingvaj baroj forigitaj“. Aŭtoro konstatas uragan bezonon por tiel universalia interkomprenilo kia dum mezerko estis latino. Kiel plej bone respondantan tiujn postulojn li montras Esperanton kun ties facila gramatiko, vere internacia radikara vortaro kaj pure fonetika literumado, dum projekto konata sub nomo „Basic English“ provis uzurpi maldirekte superecon en internaciaj rilatoj por nacia lingvo.

stk

--

S-ano Bartošík projektis nun 5 glumarkojn eldonotaj ĉi jare okaze de la 30-jara jubileo de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

II-a INTERNACIA SPORTKONKURSO DE LERNEJOJ PERE DE ESPERANTO. Jam pasintjare ni raportis pli la tre sukcesplena sportkonkurso de 10 lernejoj el kvin landoj, kiun organizis s-ano Oldřih Schwetter el la mezlernejo de Klement Gottwald en Dolní Bludovice, okze de la internacia infantago. Same nunjare li organizas multe pli grandskalan konkurson (La internacia Tago de infanola 1-an de junio) kaj ni sincere deziras al nia meritplena samideano plej grandan sukceson.

--

PLURAJ ĈS. GAZETOJ menciis, ke la 10-an de aprilo 1922 mortis F. J. CHALOUPECKÝ, kunfondinto de ĉs. Komsomol, de Komunista partio kaj organizanto de la unua Spartakiado. Neniu gazeto tamen menciis ke F. J. Chaloupecký jam en 1911 fondis Aoscion de Laboristaj Esperantistoj, en 1912-1914 redaktis ĝian presorganon „La Kulturo“ kaj eldonis tradukon de l' Internaciano en Esperanto.

Vy

--

LA INTERNACIA KONGRESO DE FERVOJISTOJ ESPERANTISTOJ en Rijeka brile sukcesis (11.-17.5.1957). Per flagoj ornamitaj stacidomoj kaj granda surskribo „Reloj ligas la landojn, Esperanto, la popolojn“ oni bonvenigis 459 kongresanojn el 14 landoj, inter ili por la unua fojo post longaj jaroj denove el Pollando, Hungario kaj Bulgario. La kongreso havis la protektor de ĝenerala direktorko de fervojoj en Jugoslavio, kiu salutis la kongreson. Granda laboro estis farita, gravaj planoj pridiskutitaj.

--

IMRICH ZÁLUPSKÝ. Ni estos dankaj por sciigo de la nuna adreso de tiu ĉi slovaka samideano.

--

Dancu, dancu, pli balu!
(Tancuj, tancuj, vykrúcaj!)

Dancu, dancu, pli balu,
nur la forno ne falu!
Varmigados ĝi nin tre
sen kusenoj dumvintre

Du manikojn mi brodis,
ciganinon mi logis:
Prenu tion, kaj por ĝi
provu Gabon alsorĉi!

Se mi faru magion,
vi alpagu plu ion!
Kvar, kvin, groŝojn mi ŝatos,
ĉarma knabo vin svatos.

Ciganinon cigano
draŝis sur la kaftano,
ciganino kvetlis,
lin per forko elpelis.

Staris garde soldato,
havis truojn en jako,
li ĝis tago postenis,
roso pluvis, li tremis.

Tomáš Pumpr

CENTRA DANA LIGO ESPERANTISTA eldonis dukoloran propagandan afiŝon laŭ projekto de nia membro s-ano Dolfa Bartošík. Lia projekto ricevis unuan premion en la internacia konkurso elskribita de la CDLE.

--

FRANCAJ KAJ ALILANDAJ SAMIDEANOJ, NI URĜEGE SERĈAS FRANCAN TRADUKON DE „MÁJ“ (MAJO), POEMO DE ĈEĤA ROMANTIKA VERKISTO KAREL HYNEK MÁCHA.

La redakcio.

--

AIR FRANCE, la plej granda aerliniaro en la mondo. Kvarpaĝa informilo, presita sur luksa papero en tri koloroj, kun bildoj, eldonita okaze de la 42-a Universala Kongreso de Esperanto en Marseille. Senpage ricevebla de AIR FRANCE, 9, Avenue Général-Leclerc, MARSEILLE/3ème/, Francujo.

--

TAGIĜO, organo de ĉs. junularo ĉesas pro teknikaj kaŭzoj aperi. Tiel informas la cirkulero aldonita al la lasta numero. Ni bedaŭras tiun ĉi fakton. Volonte ni publikigos mallongajn fakajn sciigojn laŭ niaj eblecoj, kiuj speciale pro papero estas ranzonitaj. Tamen-fortigu nin komuna espero pri baldaŭa presorgano de ĉs. esperantistaro, kiu deprenos de ni ĉiuj la jam longedaŭran ŝarĝon.

La redakcio.

--

Jozef MISTRÍK: STENOGRAFIA II. Eldonita de Slovaka pedagogia eldonejo en Bratislava en decembro 1955, enhavas gravan tekston pri Esperanto, ĝia deveno kaj signifo. S-ano Mistrík instruis antaŭ dek jaroj E-spon en Trenčín en komerca lernejo, nun li aktiva sen ŝtata instituto stenografia en Bratislava, reduktas monataĵon „Slovenský stenograf“ kaj samspecan bultenon. Ni raportis pri li kaj lia libro „Stenografia III“ jam en 1954.

--

Praha-ek-1957-47-12

BULTENO PRAHA 47 1957

- 12-

THE BRITISH ESPERANTIST en sia decembra numero 1956 alportas interesan artikolon „LA UNUAJ“. Estas plenpaĝo da historiaj datoj elprenitaj el la Enciklopedio de Esperanto, kiu al ni diras kiam ekz. aperigis la Unua Libro de Esperanto, Unua adresaro, Unua artikolo pri Esperanto, unua insigno ktp. Nin la artikolo atentigas ke: unua korespondado internacia inter infanoj okazis en 1903, aranĝita de instruistoj Ĉejka (Moravujo) kaj Ducommun (Svisujo). Unua monumento de Zamenhof: 1914 en Franzesbad. Legantoj en aliaj landoj apenaŭ scias, ke tiu instruisto Ĉejka vivas en Bystřice pod Hostýnem en Moravio kaj ke Moravio estas la meza parto de Ĉeĥoslovakio. Franzesbad esas germana nomo de banloko Františkovy Lázně en okcidenta Bohemio (okcidenta parto de Ĉeĥoslovakio). La monumento estis detruita de nacistoj.

Ŝu

--

BRAZILA ESPERANTISTO: Ĉi tiu bonega oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo estas ĉiama ligilo inter ni kaj brazila esperantistaro kaj kun plezuro ni konstatas, ke brazilajn esperantistojn interesas ankaŭ la movado en nia lando. En la numero 510-511 ni legas inter aliaj interesaĵoj ankaŭ sciigon pri la jubileo de esperanta episkopo Dro Antonín Eltschner-episkopo de Praha, pri prezentado de Pigmaliono per Verda Ĉaro de J. B., art. kolektivo de nia Klubo, kaj nekrologon pri nia membro Dro Stan. Kamarýt.

--

BULTENO DE IFEF (Internacia Federacio Esperantista Fervojista) estas tre interesa kaj plaĉa revuo kun multaj fakaj artikoloj kaj informoj. Kompreneble ni kun plezuro trovas en ĝi ankaŭ artikolojn, kiuj

origine aperis en ĉeĥaj ĵurnaloj, ekz. Železničář, Rudé Právo k. a. Numero 3 enhavas tripaĝan artikolon de inĝ. Jan Kavoda tradukitan el Zeměpisný magazín: En Ĝibuti al Addis Abeba. Alia dupaĝa artikolo pri fervojlinio Moskva-Ulanbátár-Peking estas tradukita el Rudé Právo.

--

FRANCA ESPERANTISTO en sia pasinta numero informas, ke niaj membroj Ota kaj Marie Ginz post la UK en Marseille entreprenos eŭropan prelegvojaĝon pri sia nuna patrujo Izraelo.

--

ESPERANTO SOCIETO DE BOMBAJO. El pluraj plumoj (s-ano Ribillard, k. a.) ni ekscias, ke en aprilo 1957 estis pro la instigo de s-ano Tibor Sekelj fondita Esperanto-societo de Bombajo. Ĝia prezidanto estiĝis la hinda kuracisto Dro R. Hegiée, kiu eklernis esperanton en 1951 en Portugalio kaj nun nune kun s-ano Rev. Anuruddha gvidas kurson por komencantoj. Kunvenoj de la Societo ĉiumarde je la 19-a horo de loka tempo. Sam. Rev. Anuruddha, nia bona konato, krome en sia letero skribas: „Mi mem intencas „pilgrimi“ al la UKongreso kaj komencos mian migradon tra Pakistano, Irako, Turkujo, Grekujo, Italujo al Francujo la 1-an de junio.... Estas interesa kaj instiga scii ke vi ĉiuj fervoraj esperantisto jen Ĉeĥoslovakio daŭre laboras por la Paco en la mondo pere de Esperanto. Venontsemajne mi salutos mian Societon de vialandaj esperantistoj... (Letero sendita el Bombajo la 1-an de aprilo 1957).

--

NOVAJ APERAĴOJ
kiujn ni proponas
kaj liveras nur post antaŭa pago!!!

Julian Tuwim: POEZIAĴOJ	Kĉs 15,--
Th. Kilian: ESPERANTO, uĉebnice a ĉít.	Kĉs 16,--
Julie Šupichová: Unua legato	Kĉs 5,50
12 fotografaĵoj de ĈSR –esper.eldono	Kĉs 13,--

Grava atentigo: UNUA LEGAĴO (aperos la 1-an de julio multoblige), tre utila legato por kursoj, someraj lernejoj ktp.

Kiu volas kaj mendas nur fotografaĵojn de ĈSR-esper.eldono (1887-1957), mendu ilin sendante la monsumon al Frant. Pytloun, Jungmannova 29/1, Poděbrady.

Kiu mendas kun la fotografaĵoj de ĈSR ankaŭ alian varon mendu kaj pagu al s-ano Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

Ne forgesu, ke tiel vi ŝparas al ni multan laboron kaj tempon! Koran dankon!

EL LA MOVADO DE NIAJ NAJBAROJ KAJ AMIKOJ

BULGARIO: Entrepreno „VSESTRANNI USLUGI“ (ĉiuspecaj servoj de la ĉefurba komunumo) aranĝis korespondan kurson pri Esp. La prezo por partopreno en tiu ĉi kurso estis sufiĉe granda kaj eĉ iuj skeptikaj esperantistoj opiniis, ke malmulte da civitanoj partoprenos ĝin. Spite al ĉiuj profetoj la kurso sukcesis kaj ĝis nun 1000 personoj el nia 7miliona lando lernas Esp. per tiu ĉi kurso. Pro la kunlaboro la Bulgara Esp.-Asocio ricevas certan procenton de la bruta enspezo. La supre menciita entrepreno projektas fabriki gramofondiskojn kun esp. kantoj kaj tekstoj, por ke la kursanoj povu kontroli sian prononcadon.

Bulgara Poŝta Administracio definitive decidis eldoni jubilean Esperanto-poŝtmarkon. Bulgara Esp. Asocio proponis, ke ĝia suĝeto estu: ĝenerala bildo de urbo Târnovo, kie antaŭ 50 jaroj oni fondis Bulgaran Esp. Asocion, kaj la portreto de Zamenhof. La poŝtmarko aperos dum la sekvanta somero. Okaze de la 6-a Tutmonda Junulara Festivalo en Moskvo CK de la Asocio de Bulgara Popola Junularo eldonos riĉe ilustritan libron. Ĝia provizora titolo: „Bulgara Junularo pretigas sin por partopreni la Festivalon“. Krom tio oni decidis helpi la organizadon de esp. societoj en nia lando. En la oficiala delegitaro, kiu iros al la Festivalo, partoprenos ankaŭ esperantistoj. CK de Bulgara Esperanto-Asocio dum julio-aŭgusto (1a ŝanĝo 29.7.-11.8., 2a ŝanĝo 13.8.-26.8.) organizos esperanto-tendaron en vilaĝo Borima, regiono Trojan. La vilaĝo situl en pitoreska antaŭmara obenaĵo. La partoprenantoj en ĝi ĝuos tutan kontentecon. Pri informoj skribu al Bulgara Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 66, Sofia, Bulgario.

Lastatempe ŝtata entrepreno eldonis Esperanto-Bulgaran vortaron. Ĝia eldonkvanto estas 8000 ekz. Nun oni presas lernolibron.

Ĝis aprilo bulgaraj gejunuloj esperantistoj kolektis objektojn je sumo de 1200 lv por donacoj al la gesamideanoj partoprenantaj la 6-an festivalon en Moskvo.

Nikolaj Nikolov

--

ĈINIO: E-movado en Ĉinio denove revigliĝas. La 5-an de marto ĉijare en Pekino, la ĉefurbo de Ĉina Popola Respubliko, malfermiĝis la unua Esper.kurso de post tri jaroj.

En lastaj jaroj la pli kaj pli intensa internacia kultura interfluo kaj la pli kaj pli okulfrapa efiko de Esperanto en la pacmovado ja pruĝas al la publiko, ke Esperanto, la lingvo de paco kaj amikeco, tre utilas kaj multaj personoj volas ĝin lerni kaj studi. Konsiderante tiun ĉi bezonon ekde 1956, Ĉina Esperanto-Ligo denove komencis sian laboron sub subteno de la Asocio por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj.

Lastjare, ĈEL sendis dufoje siajn delegitojn al eksterlandaj esperantistaj kongresoj: 41-a UK kaj 4-a Pollanda Kongreso. Reveninte Ĉinion la delegitoj publikigis plurajn artikolojn pri Esperanto en grandaj ĵurnaloj kaj gazetoj, inter ili estas la Popola Tagĵurnalo, la plej granda en Ĉinio, Wenhui Bao, la plej ŝatata ĵurnalo de ĉinaj intelektuloj kaj Monda Kulturo, la plej malnova gazeto en Ĉinio. En la artikoloj, la verkintoj ne nur rakontis pri la kongresoj, kongresanoj, la vivanteco kaj avantaĝo de Esperanto por solvi lingvajn malfacilaĵojn de internaciaj kunvenoj, ili precipe akcentis ankaŭ la rolon de Esperanto por intimi popolanojn en diversaj landoj kun malsamaj interesoj, religiaj kredoj kaj politikaj tendencoj.

Por pli bone antaŭenpuŝi la movadon, ĈEL jam nun restarigis siajn proprajn laborejojn. En la oficejo laboras du pagitaj laborantoj. Oni kredas, ke baldaŭ venos al ĝi pli multaj esperantistoj por entrepreni pli vastajn laborojn. La unua plej ĉefa laboro por ĈEL nun estas propagando kaj disvastigo de la lingvo inter junuloj. Tiu ĉi laboro estas subtenata de la Tutĉinia Federacio de Demokrata Junularo, la plej granda junulara organizo en Ĉinio. Ankaŭ ĝia Pekina filio fervore partoprenas la laboron. Je la 27-a de februaro ĈEL kune kun tiuj ĉi du organizoj aranĝis prelegon pri Esperanto.

Ĉeestis pli ol 320 personoj, krom pekinaj membroj de ĈEL. S-ano Hujucz, prezidanto de ĈEL kaj s-ano Yech Chun-chien, esperantisto-verkisto, prelegis en la kunveno pri neceso de Esperanto-lernado kaj pri ĝiaj historio kaj utiloj.

Samtempe oni aŭdigis en kunveno Esper.gramofondiskojn de la prelego de Dro Ivo Lapenna pri Kultura Valoro de Internacia Lingvo. Salutparolojn sur sonbando de japanaj esperantistoj oni ankaŭ aŭdigis. En apuda ĉambro estis aranĝita malgranda ekspozicio, en kiu estis ekspoziciataj pli ol 400 diversaj Esp. libroj kaj vortaroj, inklusive eldonaĵojn en Ĉinio. Tio multe helpis la ĉeestintojn kompreni, ke Esperanto jam estas vere vivanta interracia lingvo kaj ne nur iu surpapera projekto. Post la prelego multaj anoncis sin por Esperanta kurso. Sed pro multaj malfaciloj, ekz. manko de lernolibroj por komencantoj ktp. la kurso povis akcepti nur 50 lernantojn. Oni devis konsili la ceterajn iom bendi ĝis la sekanta kurso.

Krom en Pekino, Esperanto-lernado ekfloras ankaŭ en aliaj lokoj. La 18-an de marto estis malfermita same patronka kurso en Ŝanhajo. En Chungking, la instruistoj en Sudokcidenta Arta Kolegio kaj aliaj mezlernejoj sin organizas por lernado de Esperanto. Lerno-grupoj nun ankaŭ stariĝis en universitatoj en Pekino kaj Tienzin kaj aliaj mezgradaj lernejoj. Unu el ili post mallonga lernado jam komencas korespondi kun eksterlandaj esperantistoj.

Kompreneble, estas ankoraŭ multaj malfaciloj por nuna laboro. Ekz. mankas lernolibroj kaj taŭgaj vortaroj por komencantoj, ankaŭ kursgvidantoj ne sufiĉas. Esperantaeldonado, kiu povos solvi la plej ĉefajn malfacilojn, nun estas ankoraŭ en preparado. Tamen neceso estas ĉiam pli forta ol malfacilo. Estas sendube, ke Esperanto-movado en Ĉinio venkos la malfacilojn kaj el ĝi kreskos la verda entrepreno por paco kaj amikeco.

ĈINA ESPERANTO-LIGO.

Ĉina Esperanto-Ligo anoncas, ke ĉina delegitaro survoje al UK Marseille traveturos Praha kaj veturos kun la ceteraj delegitaroj el popoldemokratiaj landoj.

Laŭ oficiala bulteno de Hsinhua-filio (Telegrafa agentejo de Nov Ĉinio) en Praha oni malfermis la 6-an de marto kurson de Esperanto en Pekino. Organizas ĝin Ĉina Esperanto-Ligo kunlabore kun Tutĉinia Federacio de Demokrata Junularo kaj de Y.M.C.A. Inter kvindekunu lernantoj troviĝas kelkaj ĉinaj delegitoj por 6-a Festivalo en Moskvo. Similan kurson oni preparas eĉ en Ŝanhajo.

Okaze de la Internacia Labortago la 1-an de majo 1957 Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en Ĉeĥoslovakio ricevis agrablegajn gratulleterojn de Ĉina Esperanto-Ligo el Pekino, Esperanto-Rondo ĉe Mukdena Medicina Instituto, Pediatria Fakultato, pere de Prof. Ŝjang Cŭan-ŝen, Mukdeno, Paco-Komitato en Tientsin, The 30th Middle School en Canton, 80 kursanoj el Ŝanhajo, Entomologia Instituto de Chou, Kolegio de Agrikulturo en Shensi, Unua gimnazio en Benfu, de multaj privataj samideaninoj – (kia ĝojiga fakto) kaj samideanoj. Niaj karaj! Viaj bondeziroj estas same la niaj. Niaj sukcesoj – la viaj! Viaj leteroj kaŭzis grandegan ĝojon ne nur al ni, esperantistoj, sed ankaŭ ĉe niaj oficialaj instancoj, kie ili nun estas.

PEOPLE'S CHINA, 8-a nro, aprilo 1957 enhavas multajn interesaĵojn ne nur por ĉeĥoj kaj slovakoj, sed por esperantistoj. En la rubriko Cultural Life s-ano Honfan donas longan artikolon „Boom in Esperanto“, en kiu li donas historian evolut materialon pri la movado en Ĉinio.

BULTENO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO, nro 1, aprilo 1957 en niaj manoj. Kvankam ĝi estas pure en ĉina lingvo, ni ĝojas pro la fakto, ke ĝi rekomencis aperi. Bela koperto, kvalita papero, agrabla presaranĝo-modela enlanda informilo.

Adreso de Ĉina Esperanto-Ligo: P. O. Kesto 77, Peking, Ĉinio.

El letero de nia membro Dro Sáva Heřman, asistanto de ĉeĥa lingvo ĉe pekina universitato, kiu skribis al ni la 11-an de majo:

... „De marto komencis funkcii Ĉina Esp.ligo. Kvankam ne ankoraŭ plene aprobita, tamen praktike funkcianta. Same en marto unua konveno de interesuloj kaj unua kurs opor komencantoj. Antaŭ nelonge mi vizitis ĝin. Ĝi troviĝas en la orienta urboparto, en la strato Tungtan, en la lernoĉambroj de YMCA. Ni paŝis tra longaj koridoroj a lunu klaso, kie s-ano Tikas (lia esper.nomo) klarigis misteraĵojn de Esperanto al proksimume 30 lernantoj el plej diversaj sociatavoloj kaj generacioj, de knabinoj al maljunaj sinjorinoj, de oficistoj al studentoj. Mi tre interesigis pri la rezultoj kaj pri sukcesoj de uzo de la metodo de s-ano Tikas (metodo analitika-sintetika, klarigo kaj traduko de tekstoj. Ĉe-metodo ne estas praktikata ĉi tie, ĉar po ĉinoj ĝi estas malfacila, kiel asertas la samideanoj. Volonte mi tion spertus). Je miaj malrapide prononcitaj demandoj la kursanoj respondadis kaj ilia prononcado estis entute komprenebla, kvankam ne modela. Ekzistas malfacilaĵoj dum la prononcado de -r- inter vokaloj kaj en grupoj br, pr, kr, gr kaj simile, malfacila diferencigo de ĝ, ĉ, ĵ kaj multaj aliaj malfacilaĵoj, inter alie ankaŭ malfacile komprenebla intonado de frazo. Sed malgraŭ tio la lernantoj diligente lernas kaj post unu monato ili ekregis Esperanton kiel samon el alia eŭropa lingvo post 6-10 monatoj. Nun mi estas ofta gasto en nova oficejo en Ĉina Esp.ligo (strato Magia mian 12) proksime de la urba centro. Regule tie deĵoras du samideanoj, konata s-ano Honfan (kiu kun Li Jan Jon tradukis „Mutan barikadon“) kaj s-ano Zensto. Multiĝas la korespondado, regule venadas ankaŭ nia Bulteno. Denove estis malfermita esper. biblioteko. Estas ĝoje rigardi disfloron de esperantista vivo, kiu ankaŭ ĉi tie de 1953 vegetis preskaŭ ilegale. Sed pasintjare en junio proklamis la Komunista partio de Ĉinio konatan devizon: „Floru ĉiuj floroj de arto, rivalu diversaj skoloj de pensado!“ Kaj unu el la floroj estas ankaŭ Esperanto – verda floro. Tre saĝe oni substrekis, ke ĉiuj aferoj devas esti pridiskutitaj, ne eblas ilin laŭdogme solvi aŭ eĉ malpermesi (ĉefartikolo de Ĵenmin Ĵipao el 10. 4. 1957). Ni ĉiuj ĉi tie esperas, ke komencas tempo de plena disfloro de nia movado en Ĉinio. Kompreneble sen granda penado de orloj ne estos rezultuj. Ĉinio estas tiel malfacile ampleksa, ke ĝi bezonos tutajn armeojn, por entute konatigi la poklon informe pri Esperanto. Sed ĉinaj esperantistoj ne lasas sin antaŭigi per la evoluo. Dum la antaŭvespero de la 1-a de majo oni organizis la Unuan kunvenon kaj solenan internacian vesperon, kien estis bonvenigitaj franca esperantisto, ĵus estanta en Pekino, Roger Lallemand, germana studento Salzmänn kaj mi.

En la salono de hotelo Chepching (Paco) kunvenis pli ol 100 esperantistoj, kun granda atentemo aŭskultis esper.prelegon de provizora prezidanto s-ano Hujucz, kiu substrekis la signifon de tiu ĉi kunveno kaj prezentis la francan esperantiston. Li en bona lingva formo parolis pri instruista movado en Francujo k. s. Mi koncize parolis pri kialoj kaj supozoj de nova disvolvo de Esper.vivo en Ĉinio, pri kaŭzoj politikaj (agado de disvolvado de kritiko, de floroj) kaj pri avantaĝo, eĉ neceso de rekta kontakto de ĉina popolo kun la mondo helpe de plej facila lingvo okcidenta, eŭroptipa. Samtempe mi menciis pri miaj sperte kun la instruado de ĉeĥa lingvo, kiujn mi komparis kun esper.

Interesan prelegon havis ankaŭ s-ano Salzmänn el GDR, juna esperantisto, studanto de Pekina universitato. – Ĉeestis multaj esperantisto jel diversaj vivfakoj, studentoj el la Instituto de rusa lingvo, kie mi havos konsultaĵlecionojn pri Esperanto, prelegantoj el la Instituto por naciecaj minoritoj, laborantoj el diversaj eldonejoj, el Asocio de verkistoj ktp. Multpromesa vespero estis finita per gramofondiska prelego de Ivo Lapenna kaj per la himno La Espero. – Ni komencis, kaj tio estas ĉefaĵo!!! Nun ofte mi veturadas, instruas ĉinajn samideanojn la prononcadon, simple mi estiĝis vaganta misionulo. Tiel mi funkciis antaŭ nelonge ĉe Flava riverego en Ĉengĉou kaj alie. Estas bela jak interesa laboro. Kun multaj samideanaj salutoj al ĉiuj niaj esperantistoj – legantoj de Bulteno, via Sáva Heřman.

GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO. La korespondanto de nia Bulteno anoncas al ni la 7-a de majo 1957: La plej konstantefika laboro por Esperanto en nia respubliko estas farata de samideano Schödl, la direktorko de meza lernejo „Friedenschule“ (Paca lernejo) en Neuruppin, distrikto Brandenburg. Nia lingvo estas tie instruata libervole – mi kalkulas de post 1 kaj duonjaro. Li interligas la lernantojn kun eksterlandanoj kaj instigis samideaninon el Svedio viiti Neuruppin kaj la lernantojn esperantistajn kaj neesperantistajn. Kiel mi scias, estas la poresperanta laboro de s-ano Schödl ĝis nun ne ĝenata.

Tre aktivaj kaj sukcesplenaj estis ankaŭ niaj samideanoj en la landa distrikto Dresden. Ekzemple: La pedagogia konsilantaro de meza lernejo en Radebeul apud Dresden decidis instrui Esperanto kiel libervola objekto.

En la profesia lernejo en Radebeul lernis kvar instruistoj nian lingvon. Paske 1957 devis okazi senĝena renkontiĝo de samideanoj en Riesa apud Elbe (Labe), distrikto Dresden. Ĉi tiu renkontiĝo estis nuligita ĉar intertempe la estraro de la distrikto Dresden malpermesis ĉiun agadon por Esperanto. Sole korespondado ankoraŭ estas ebla en privata senco. La ordono el januaro 1949 validas bedaŭrinde ankoraŭ.

En la distrikto Leipzig ekzistis de post pli o lunu jaro rondeto en urboparta distrikto en la kardo de la paca movado. Por diversaj kontraŭstaroj, precipe en nia distrikto ĝi estis granda sukceso. Komence de la kuranta jaro provis la anoj de la „Socialista Unueca Partio“ disvastigi la laboron en la kadro de la tuturba distrikto. Speciale ni celis plilarĝigi nian laboron en porpacaj medioj. Bedaŭrinde pro la ekzistanta malpermeso el la jaro 1949 ni devis ĉesi nian agadon interne de la paca movado. La nuntempa situacio estas tia, ke ekzistas permeso labori por Esperanto por la mondopaco, sed tamen en la distriktoj Dresden kaj Leipzig tiu permeso ne estas utila por nia laboro. Kelkaj anoj de la Socialista Unueca Partio interrilatas kun la Centra Komitato de la partio por aliigi tion malĝojan stato de nia afero.

Helmut Moesner, Leipzig.

Delegitoj el diversaj lokoj de Ĉeĥoslovakio, kunvenintaj dum la regiona konferenco de Esp. rondetoj la 21-an de aprilo en la ĉefurbo Praha pritraktis la mizeran situacion de siaj germanaj gekamaradoj kaj unuanime decidis per sia influo hlepi al ili. Estis sendita letero kun subskribuj de ĉiuj delegitoj al S. U. P. de Germanio kun postulo, ke tiu esploru la aferon kaj donu al la esp. pacdefendantoj ĉiuj eblecojn al libera agado per Esperanto por la paco, kiel jam de longe estas ceteraj popoldem. landoj. Kolektivoj kaj unuopuloj esprimu similajn dezirojn al Sozialistische Einheitspartei Deutschlands Zentralhaus der Einheit, Wilhelm Pieck-Str.1, BERLIN-N 54, DDR.

Rudolf Burda, prez. de MEM.

HUNGARUJO:

Oficiala delegitaro partoprenos la 42-an UK en Marseille. La ministerio por klerigado, la ministerio por eksterlandaj aferoj kaj la Instituto por Kulturaj Rilatoj jam akceptis la proponon sendi 3-membran delegitaron. Oni intencas ankaŭ nunjare sendi oficialan reprezentanton, kiel okazis pasintjare dum la 41-a UK. – En la ministrejo ricevita aparta ejo por kontoro de HEK kun ĉiuj teknikaj rimedoj. La nova adreso estas: Hungarlanda Esperanto Konsilantaro, Budapeŝt 5, Pf. 129. – En kvar koloroj eldonitaj junbileaj glumarkoj. – Gazetoj de la tuta lando favore publikigas sciigojn de HEK, novaj rondetoj estas fondataj. La II-a Budapeŝta Renkonto de Esperantistoj okazis la 14-an de aprilo. Speciala poŝtstampo kun esp. surskribo: II. Teritoria-Esperanto-Renkontiĝo-Budapeŝt – 1957. Ápr.14. – Sciigojn pri la movado oni trovas en multobligata Bulteno de HEK kaj ankaŭ en kluba bulteno VERDA VOJO en Miskolc.

La 9-an de junio estos Esp. ekspozicio en Kulturdomo Rózsa Ferenci, Budapeŝt VI kun poŝtofiĉejo konta esp.stampon kaj tiam aperos du esp. jam anoncitaj pm. kaj unuataĝa koperto (mondeblaj por 4

resp. kup. ĉe Hungara Esp.Instituto, s-ano Lajos Márton, Budapest XII, Bors u.2) IV. – Landa kongreso ne okazos nunjare, nur intima delegáta konferenco kaj la 29.-30. de junio Sudhungarlanda regiona esp. konferenco en Szeged. Adreso: prof. Ernő Farkás, Szeged, Pusztaszeri ut.15.

Praha-ek-1957-47-17

BULTENO PRAHA 47 1957

- 17 -

JUGOSLAVIO:

Post longa kaj zorgema preparado komencis aperadi Jugoslavia enciklopedio. Ĝi grave diferenciĝas de la aliaj enciklopedioj per tio, ke ĝi estas dividita en specialajn memstarajn partojn: Jugoslavia enciklopedio, 8 volumoj; Ĝenerala enciklopedio, 6 vol.; Marscienca enciklopedio, 7 vol.; Enciklopedio de bildkartoj, 4 vol.; Muzika enciklopedio, 2 vol.; Arbarscienca enciklopedio, 2 vol.; Medicina enciklopedio, 6 vol.

Ĝus aperis la 2. vol. de Ĝenerala enciklopedio, kiu entenas la glosou: Cseh, Andreo; Chavet, Gabriel; Esperantisto, La kaj Esperanto. Aliaj glosoj pri esperantisto kaj famaj esperantistoj aperos en sekvantaj volumoj de ĉi tiu parto.

En preparo estas ankaŭ Bibliografio en 35 volumoj, kiu stenos ne nur la librou aperintajn en Jugoslavio, sed ankaŭ librou skribitajn de Jugoslavianoj aperintaj en eksterlando. Ankaŭ valoraj gazetarartikoloj estos glosataj. Adreso: Leksikografski závod, Strossmayerov trg 4, ZAGREB, Jugoslavio.

F. Novljan, Zabreb.

POLLANDO:

NEPRE GRAVA SCIIGO!

ĴUS NI RICEVIS POR DISTRIBUO: BOLESŁAW PRUS: F A R A O N O (3 volumoj)

Koste kun afranko Kĉs 80. Mendojn direkt al J. Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

WROCLAV anoncas: La 16-an de februaro okazi sen Wrocław solena malfermo de Esperanto-Klubo ĉe Pafawag. La nomo Pafawag estas mallongigo de Państwowa Fabryka Wagonów – Ŝtata Vagon-Fabriko, kiu estas unu el la plej grandaj tiaspecaj entreprenoj en Eŭropo. La solenaĵon inaŭguris direktorko de la fabrikego s-ro Ślusarek, distranĉante ruĝan rubandon sur la klubeja pordo. Poste li faris paroladon tre simpatian al Esperanto kaj mem promesis esperantiĝi. Ankaŭ la Laborista kaj Entreprena Konsilantaroj favoras al Esperanto. Post s-ro Ślusarek parolis s-ano red. Monkiewicz – reprezentinto de la Ĉefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando. La Klubo ricevis luksan sidejon en centro de la urbo, konsistantan el belega klubsalono, lecionejo kaj sekretarieja ĉambro.

En Vroclavo kaj ekster la urbo okazas nun 10 Esperanto-kursoj. Por la gekursanoj kaj por niaj membroj ni aranĝas letervesperon: Grandskala letervespero okazos en Wrocław (Pollando), jestota de 100 membroj kaj pli ol 100 gekursanoj-finintoj. Leterojn, poŝtkartojn skribu amase al la adreso: Związek Esperantystów w Polsce, Oddział we Wrocławiu, WROCLAV, ul. Dubois 3.

--

ANNA ALAMO-SANDGREN en aprilo rondveturis Pollandon. Ĉe la tombo de la Majstro ŝi metis florojn de Svedio. En Gdańsk ŝi partoprenis internacian renkontiĝon.

--

Ĉu ebla, nur kun escepto de kelkaj artikoltitoloj, pure nacilingva grandformata presita gazeto pri Esperanto Asocio de Esperantistoj en Polujo tion pruvis per eldono de okpaĝa „ESPERANTO-JĘZYK MIĘDZYNARODOWY“, kies celo estas ankoraŭ pli diskonigi Esperanton en ĝia vera patrujo. Unu ekz. kostas 2 polajn zlotojn. Gazeta enhavo tuŝas ĉiujn eblajn temen el historio kaj nuntempo de Esp-a movado en Pollando kaj alilande. Ĝi, eldonita eĉ esperantlingve povus fariĝi ĉie bonvenata mondskala informilo. Samtempe ĝi certe bonege funkcius kiel viva Esperanta kroniko kaj signifus gravan pli

vivecan aldonon al „Esperantologio“, iomete seka el vidpunkto de vastaj legantaraj vicoj. Sinceregajn gratulojn, polaj samideanoj!

Stk

--

Aperis: Mielcarek Józef: Skrypt do nauki języka międzynarodowego esperanto. Poznań 1956. Związek Esperantystów w Polsce, Oddział Rozmn.-Zakład Prod. Skryptów Politech.Pozn. 29x20 cm, pğ. 40, eldonkvanto 500 ekz.

RUMANIO:

La Iniciata Komitato por Esperanto de R. P. Rumana (adreso: Poŝtkesto 205, Bukureŝto, R. P. Rumana) dankas al ĉiuj frataj kaj samcelanaj organizoj, kiuj reprenis la informilon pri la estiĝo de la komitato kaj por la kuraĝigaj leteroj kaj proponoj por apogo de la rumana esperantista movado.

-

La bukareŝtaj esperantistoj kunvenadas ek de monato januaro 1957 ĉiun merkredon inter la horoj 19-22 en la klubejo de la Sindikato de la Klerigaj Laborantoj, en Bukureŝto, Bulev. 6 marto nro 32.

Dum la monato marto ekfunkciis en Bukureŝto jenaj kursoj por komencantoj: S-ano J. Petrin gvidas kurson kun 50 lernantoj en la supermenciita klubo; s-ano Prof. A. Boia gvidas du kursojn kun 70 lernantoj de la Ŝtata Mezlernejo por Stenodaktilografio.

Dum la monato februaro 1957 en la kadro de la Blindula Asocio en R. P. R. la grupo de malnovaj esperantistoj nevidantoj fondis esperantistan sekcion. S-ano George Konstantin komencis tie ĉi kurson kun 12 nevidantoj.

Ĝis nun ankaŭ en aliaj 10 urboj de la lando la esperantista movado revigliĝis. En la urbo Oradea s-ano Edmondo Vincze gvidas kurson kun 20 komencantoj. En la urbo Odorhei (autonoma Regiono Magiara) s-ano Jozefo Teleki gvidas kurson kun 50 lernantoj.

La Institut opor Lingvoscienco en R. P. R. debatis la problemon de la utileco de la lingvo Esperanto kaj respondis skribe al la Iniciata Komitato, la 13-an de marto 1957, ke unuanime la Konsilantaro de la Instituto rekonas la utilecon de la disvastigo de la lingvo Esperanto kaj ĝian estron kiel internacia interkomprenilo. Samtempe la Fako por Lingvoscienco kaj Literaturo de la Akademio de R. P. R. skribe sciigis, ke la Faka Plenkunsido konkludis pri la utileco de la lingvo Esperanto.

Ambaŭ plej gravaj sciencaj institucioj el la lando rekomendas la apogon de la agado de la Iniciata Komitato por Esperanto en R. P. R.

Iniciata Komitato por Esperanto.

SOVETUNIO:

Josef Kožený, org. sekciestro de TKKE: Rememoroj el Sovetio.

Hazarda alikaŭza elekto sendi min al Sovetio ebligis al mi ekkontaktiĝi kun sovetiaj esperantistoj en Leningrad kaj Moskva. Antaŭ ĉio mi volas publike danki por vere amike afabla akcepto al k-do Podkaminer kaj Toll en Leningrad kaj Bokarev, Gusev, Rytjkov, Sergejev en Moskvo krom multaj aliaj. La restado inter ili, neforgesebla amika atmosfero kaj gastamo vekis rememorojn, kiujn mi konservas por ĉiam, ne parolante pri amikeca konduto de la amaso kontraŭ ni. Tamen kiel esperantisto mi havis multajn preferojn. Veninte al Leningrad mi serĉis laŭ adreso k-don Toll. Ne trovinte lin hejme, mi tie trovis junan admirantinon de nia popolo, kiu transdonis al li mian leteron; post unu horo li venis kaj ne sola; li venigis k-don Podkaminer kaj tuj komencis malgranda konferenco. Mi eksciis pri ekzisto de 24 grupoj ĉe 9 altlernejoj, kie estas instruataj 600 studentoj, pri studo individua de 20 instruistoj, pri eldono de hektografiita lernolibro, pri tio, ke jam en 120 urboj ekzistas vigla E-movado, ke jam 160 ĵurnaloj raportis pri esperanto, ke oni havas je dispono belajn ejojn (3 en Leningrad en Domo de scienculoj kaj en domo de fabriko Skorochod), pri tio, ke oni traktas kun armeniaj k-do pri eldono de sovetia numero de la Paco, ke oni sukcesis aranĝi jam 6 radiodisaŭdigojn pri Festivalo, ke oni preparas eldonon de diversaj libroj, ke oni eluzos viklecon de la movado en Latvio (ekz. en Riga estas jam 1500 esperantistoj, aperis tie E-latva vortaro), ke oni preparas delegacion por Marseille kaj precipe ke oni preparas grandskalan akcepton de junaj verdaj partoprenantoj ĉe Festivalo kaj en Leningrad kaj aliaj urboj.

Same en Moskvo estas vigla vivo esperantista, estas aranĝataj kursoj, k-do Bokarev preparas eldonon de grava verko pri evoluo de internacia lingvo, kiun Akademio envicigis jam en sian planon, kvankam la verko ne estas ankoraŭ pretverkita, oni sukcesis atingi akcepton ĉe ministro Molotov ktp. kaj tial oni kalkulas kun baldaŭa restarigo de tutsovetia E-organizo.

Jen, karaj legantoj, kelkaj preskaŭ telegrafstilaj informoj. Multajn plurajn kaj pli detalajn mi povos doni al vi buŝe ĉe diversaj okazoj, kiuj dependas de via invito. Samideanoj en Sovetunio admiras niajn sukcesojn (precipe tiun de Verda Ĉaro, al iu mi alportis specialan omaĝon) kaj mi estas certa, ke niaj pluaj rilatoj estos ĉiam pli kaj pli profundaj kaj ke ni baldaŭ havos okazon akcepti sovetajn k-dojn inter ni.

La korespondanto de BULTENO el Moskvo raportas: La 27-an de marto en Muzeodomo de Dostoevskij okazis kunveno de junaj Moskvaj esperantistoj. La temo estis preparo de la VI-a Festivalo. Kiel reprezentanto de labora esperantista grupo malfermis la kunvenon Ludmila Bokareva, studentino de Moskva Universtato. Poste faris raporton pri la V-a Varsovia Festivalo franca esperantisto studento de l'Moskva Universtato Michel Duc Goninaz. Precipe detale li priskribis esperantistan renkonton. Samtempe li rakontis pri la esperantista movado en Francio. Arnor Hanibalsen-islanda esperantisto, ankaŭ studento de l'Moskva Universtato aldonis certajn detalojn pri la Varsovia Festivalo kaj rakontis pri la esperantista movado en Islando. Moskva aktoro N. Ritjkov priskribis siajn impresojn pri Leningrada esperantista vivo, de kie li ĵus revenis post kelkaj prelegoj, faritaj tie. Scienca kunlaboranto de la muzeo faris kelkajn rimarkojn rilate popularigon de Dostoevskij-muzeo dum la Festivalo. Li opiniis necesa fari ekskursojn al la muzeo kun esperantistaj gvidantoj kaj fari ĉie esperantaj surskribojn sur la eksponaĵoj de la muzeo. Ludmila Bokareva rakontis pri la planata esperantista kunveno en Moskva ŝaka klubo, kien estos invititaj po unu esperantisto de ĉiu nacia delegacio. Kaj estis pridiskutataj du raportoj. Unu el ili pri la rolo de Esperanto en la pacmovado. Ludmila Bokareva alvokis ĉiujn ĉeestantojn pripensi proponojn kaj sugestojn por kiom eble plej bone aranĝi la renkonton. Krome ŝi petis prepari donacojn kaj memoraĵojn por la eksterlandaj delegitoj. La vespero finiĝis per arta prezento. La aktoro N. Ritjkov deklamis originalajn versojn de I a Kalocsay kaj tradukojn de Majakovskij. Verkistino Auerbaĥ recitis siajn rakontojn. Ĉiujn sugestojn, proponojn, informojn kaj demandojn rilate la VI-a Festivalo oni direkt al Internacia Festivala Komitato, Moskvo G-34, Kropotkin str. 37.

N. Danovskij.

Litova korespondanto de Bulteno raportas: LA RESPUBLIKA KUNVENO DE ESPERANTISTOJ EN LITOVA SSR. Oni elektis la komitaton por reorganizi la asocion de esperantistoj de Litova SSR.

La 28-an de aprilo 1957 en Kaŭnas okazis la republika kunveno de esperantistoj en Litova SSR. Ĝin partoprenis multaj Esperanto-pioniroj kaj novaj, junaj es-pistoj el ĉiuj altlernejoj de la lando. Post la malfermo la unuan salutparolon diris unu el la pioniroj V. Ruokis, 71-jara profesoro de Kovna Terkultura akademio. „Dro Zamenhof ligis la ideon de internacia lingvo kun la ideo de paco. Tial ni reorganizigu kaj, uzante Esperanton por plivastigi internacian kunlaboradon kaj amikecon, ankoraŭ pli forte batalu por la paco, por ke la homaro povu trankvile vivi kaj labori por la plej progresiva socialista sociordo.“

En la kunveno prelegis: 1. s-ano E. Medonis pri „Ideo de internacia lingvo ĝis Esperanto“; 2. studentino A. Prapuolenytė pri „Dro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto“; 3. stud. Galkus pri „Esperanto nune“. La prezentantoj de E-rondoj en la altlernejoj parolis pri la agado de iliaj rondoj kaj malhelpaĵoj de priesperanta laboro (provizora manko de lernolibroj, nericevo de esp. gazetoj ktp.). S-ano I. Cieška informis, ke la ŝtata eldonejo baldaŭ aperigos Esp. lernolibron kun vortaroj. En la kunveno cetere parolis aliaj Esp. pioniroj: S. Tjunaitis (kies esp. lernolibro por litovoj estas aperinta jam en la jaro 1912), J. Lazauskas (ankaŭ la aŭtoro de la jam elĉerpiĝinta Esp. lernolibro), la pentristo P. Tarabilda (li nune pentos la portreton de dro Zamenhof), V. Kazlauskas k. s. La kunveno elektis la komitaton por reorganizi la asocion de esperantistoj de Lit. SSR. En la komitaton estis elektitaj 20 s-

anoj: prof. V. Ruokis, E. Medonis, A. Latonas, A. Gvalda, S. Tijūnaitis, B. Kazokienė, P. Tarabilda, A. Prapuolenytė, L. Noreika k.s.

E. Medonis

Praha-ek-1957-47-20

BULTENO PRAHA 47 1957

- 20 -

Estona korespondanto de Bulteno raportas: Kvankam la movado en Estona SSR nekutime denove floras, nur mallonge pri Pärnu, kie ni organizis la Esp. rondon, kiun partoprenas pli ol 50 geesperantistoj. La kunvenoj okazas ĉiulande en la urba kulturdomo. Aperas viva gazeto. Pri graveco de la movado en Pärnu estas grava banloko kaj kurorturbo. Ĉi tien veturas laboristoj el ĉiuj niaj respublikoj, el ĉiuj urboj. Via Bulteno multe helpas en nia laboro kaj ĝiaj informoj bone al ni servas.

V. Riis.

La raporton de nia korespondanto L. Kapustin el Gorkij ni publikigos en la venonta numero.

Al tre multaj gesamideanoj, kiuj gratulis nin okaze de la Internacia Labortago ni vere amiko kaj elkore dankas kaj reciproke!

VIETNAMIO.

FONDO DE VIETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO.

(Tradukita el la gazeto „Tien-Phong“ (Antaŭgvardio) de 26.1.1957, nro 155, ĉeforgano de Vietnamia Laborista Junularo).

La 9-an de decembro 1956 oficiale fondiĝis la Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) en Hanoi (ĉefurbo de Vietnamia Dem. Respubliko). VPEA estas sekcio de Mondpaca Esperantista Movado kaj membro de la Monda Packonsilantaro en Vietnamio. Tiu asocio estas kultura popola organizo, kiu celas defendi la mondpacon, firmigi la amikecon inter la tutmondaj popoloj kaj helpi al kulturaj interŝanĝoj inter la landoj pere de la Internacia lingvo Esperanto. Ĝia provizora centra komitato konsistas el:

Honora membraro:

HOANG-MINH-GIAM, profesoro, deputito, ministro de kulturo,

NGUIEN-VAN-HUYEN, profesoro, ministro de klerigado,

NGUYEN-VAN KINH, deputito, plenrajtigita ambasadoro de la Vietnamia Demokrata Respubliko en Sovetunio, esperanto de MEM

CU-HUY-CAN, poeto, vicministro de kulturo,

SUONG-BACH-MAY, deputito, membro de Monda Packonsilantaro en Vietnamio, vicprezidanto de Vietnamia-Soveta Amikeca Asocio.

Prezidantaro:

NGUYEN-DUC-QUY, deputito, estro de Eldona Departemento en Kultura Ministerio

Vicprezidantoj:

DAO-DUY-KY, verkito, estro de Popolkultura Dep. en Kulturministerio,

NGUYEN-CONG-MON, oficiro en Vietnamia Popola Armeo, eksmembro de Iniciativa Komitato de la Sudvietnama Esperantista Asocio,

NGUYEN-HAI-TRUNG, poeto kaj ĵurnalisto, redaktoro de gazeto „Literaturo kaj Arto“ (ĉeforgano de la Vietnamia Liter. kaj Arta Asocio)

Ĝenerala sekretario:

DAO-ANH-KHA, poeto kaj ĵurnalisto, redaktoro de ĵurnalo „La Popolo“ (ĉeforgano de Vietnamia Laborista Partio), nuna peranto de MEM

Membroj:

LE-TUYET-TRANH, ĵurnalisto, redaktorino de ĵurnalo „La Virino“ (ĉeforgano de la Vietnamia Virina Federacio),

LE-QUANG-TOAN, vicprezidanto de la Vietnamia Junulara Federacio, prezidanto de la Vietnamia Studenta Federacio,

TRAN-TRONG-QUAT, konstanta membro de Centra Komitato de la Vietnamia Laborista Junularo,

LUU-HUU-PHUOG, muzikanto, membro de la Centra Komitato de la Vietnamia Literatura kaj Arta Asocio,

TONG-DUC-VIEN, deputito,

BACH-NANG-THI, profesoro, vicdirektoro de Liceo Chu-van-An (Hanoi),

NGUYEN-MIH-KINH, profesoro, vicdirektoro de Liceo Tay-son (Hanoi).

LP

ESPERANTO-KURSOJ KAJ KONFERENCOJ. Dum la lastaj 3 monatoj de 1956 la Iniciativa Komitato de la Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio aranĝis 7 konferencojn pri Esperanto por la Mondpaco en jenaj lokoj: klubejo „Unuiĝo“ en Hanoi, Granda Teatro en Hai-phong kaj membro da linceoj en Hanoi, kiel Chu-van-an, Trung-vuong, Nguyen-trai, Tay-son, Thang-long, Truong pho-thong cap.3 Hanoi. La aŭskultantaro nombris pli ol 5 mil kaj duono el ili estis intelektuloj kaj studenta junularo.

Tiutempe pli ol 500 gelernantoj vizitadas vesperajn Esperanto-kursojn, gvidantajn de VPEA. La Artista Ansamblo de la Vietnamia Popola Armeo ĵus decidis ellerni Esperanton kun helpo de VPEA por prepari sin por la VI-a Junulara Festivalo en Moskvo. VPEA preparas publikigon de statutoj. Gejunuloj, kiuj deziras aliĝi al VPEA, sin turnu al s-ano DAO ANH-KHA, ĵurnalo NHAN-DAN, Hanoi.

LP, Dao Anh KHA

Vietnama Pacdefenda Esperantista Asocio, - DAO NHÂN-DÂN, Hanoi, Vietnamio interŝanĝos E-aĵojn por ekspozicioj, tradukservon, informojn kun ĉiuj landaj E-organizoj. Landoj, kiuj ne havas poŝtajn rilatojn kun ni,, sendu al nia peranto k-do Nguyen-duc-Guy (Bồ văn hoã) – Ambasadorejo de Vietnamio, MOSKVO – USSR. Notu bone, ke la adreso de k-do N. V. Kinh, 3 Thuy Khuc, Hanöi, ne plu validas. Sendu ĉion al ĉi supra adreso.

Studenta vietnama gazeto SINH-VIEN en la numero de januaro 57 publikigs interesan artikolon „Lernu Esperanton“ de k-do LE Quang-Toan, estrarano de studentka unuiĝo.

LA VIETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO AKCEPTIS LA POLAN REGISTRAN DELEGITARON. La 4-an de aprilo 1957 nokter organizis la VPEA solenan akcepton de la pola registra delegitaro ĉe la Granda Teatro en Hanoi, okaze de la 70a datreveno de Esperanto kaj la 40a mortotago de ĝia kvinto la pola lingvisto dro L. L. Zamenhof.

K-do Kujveluk, ministro por kulturo kaj k-do Stavinski, ministro por la malpeza industrio el la pola regist.delegacio ĉeestis kaj prezidis la jubilean feston. La estraron partoprenis ankaŭ k-do Hoang Minh Giam, ministro por kulturo, Nguyen Van Huyen, ministro por instruado, Nguyen Van Kinh, plenrajtigita ambasadoro de la Vietnamia Demokrata Respubliko en Sovetunio, Duong Bach May, vicprezidanto de la Vietnamia Sovetunia Amikeca Asocio kaj Dao Duy Ky, estro de la Popolkultura Departemento en la ministerio por kulturo.

La jubilean kunvenon inaŭguris k-do Hoang Minh Giam rememorigante la vivon kaj verkon de d-ro Zamenhof. Li substrekis la rolon de la internacia lingvo Esperanto, kiun ĝi ludas en la batalo por la mondopaco kaj interpopola amikeco kaj speciale li akcentis la modelan rolon de Polio, kiun tiu lando ludas por la disvastigo de Esperanto por servi al la mondopaco kaj plialtigi de ĝia literaturo.

K-do Dao Anh Kha, la ĝen. sekretario de VPEA prelegis pri la genio de la internacia lingvo kaj pri la fundamentaj vidpunktoj koncerne Esperanton.

Pli ol 50 delegitoj de la esp. junularo en la ĉefurbo el la linceoj Trung Vuong, Tay Son, Nguyen Tray, Chu Van An, Thang Long kaj el la armea junular-ansamblo, partoprenanta la Vlan Festivalon en Moskvo, alvenis por saluti la emitentajn gastojn el la patrujo de Esperanto, prezentis a lili florbukedojn, kolektivajn salutleterojn, brodaĵojn ktp. Dum ĉi solena bonvenigo esperantista ĥoro kantis japanan popolkanton „Pereu la Atombombo!“ esperantlingve. Poste la polaj gastoj akompanataj de la ĉeestantoj vizitis ampleksan Esperanto-ekspozicion, en kiu estis reprezentita la tuta mondo. Ni esperas, ke niaj gastoj forportis la plej bonajn impresojn pri nia interfratiga lingvo al sia patrujo.

LP.

Vietnama MEM-sekcio

Soveta adresaro en vietnama junulara gazeto. Semajna vietnama junulara gazeto TIEN-PHONG (Antaŭgardio) en la numero de 5. 3. 1957 publikigis multajn adresojn de sovetaj esperantistoj, komunikitajn de VPEA.

LA 5-an DE JUNIO 1957 RADIO ROMA: MORTIS F. V. LORENZ.

La 24-an de decembro 1957 atingus la 85-an jaron de sia aĝo nia atestimata samideano František Vladimír Lorenz en Dom Feliciciano, ŝtato Rio Grande de Sul, Brazilo. Lorenz naskiĝis en 1872 den Bohemio en Bohdaneč. Esperantisto de la unua horo, li estis versimile ankaŭ la plej malnova vivanta esperantisto en la mondo. Kiel dekokjara junulo li verkis la unuan lernolibron de Esperanto por Ĉeĥoj, eldonitan proprakoste ĉe Hoblík en Pardubice en la jaro 1890. Estante suspektata de la tiama aŭstria polico pro siaj progresemaj ideo, li rifuĝis en Brazilon, kie li estis la unua homo, parolanta Esperanton.

Lorenz partoprenis ĉiam aktive la movadon por la Internacia Lingvo, sed lia plej signifa agado estas la literatura (precipe tradukoj en Esperanton el 44 lingvoj, ekz. Diverskolora Bukedeto kaj la fama malnovhinda Bhagavâd Gitâ). Lia literatura aktiveco ampleksas 16 gravaj librou kaj 20 volumojn da tradukoj en la Portugalaj lingvon. Honore al nia fama samlandano, la brazilaj esperantisto jen Santos fondis en 1940 Esperantistan Grupon „Francisco Vladomiro Lorenz“.

Ni profunde bedaŭras la forpason de nia brazila samideano kaj samgentano!

Jar. Mařík

ESPERANTISTA VIVO EN ĈEĤOSLOVAKIO

BAJČ (distrikto Hurbanovo):

Komenciĝis kurso por 12 gelernantoj. Instruas s-ano Slávik, lernejdirektoro.

BANSKÁ ŠTIAVNICA:

Ĉe ĥemi-industria mezlernejo la 23. 11. 1956 fondita rondeto, kiu nun havas 46 membrojn. La rondeton estras s-ano Fr. Zöld.

BRNO:

La Klubo honorigis la mortotagon de la Majstro la 23. 4. 1957 per altnivela koncerto en reĝio de profesoro Vilibald Scheiber. La 7. 5. 1957 prelegis kaj filmojn pri Gronlando prezentis s-ano Josef Vitek.

La tramista Esperanto-klubo ree funkcias. Kunvenoj okazas ĉiuĵaŭde je la 18-a horo ens trato de 1-a Majo, nro 22. La „Prŭmstav“ esp. klubanoj daŭre kunvenadas ĉiumerkrede je la 17-a horo ens trato Jozefská nro 16. En ambaŭ kunvenejoj Esperanton oni senpage instruadas. La instruadon ambaŭloke gvidas k-do Slavík. Gekamaradoj, sendu viajn gekonatojn al la du kluboj por lerni Esperanton! La kunvenoj daŭras du horojn.

Josef Ballay

BUDIŠOV NAD BUDIŠOVKOU:

La 26-an de majo en klubejo de LNH-fabriko aranĝita regiona konferenco. De monato septembro 1956 kurso por komencantojn kun 9 gelernantojn. Gvidis s-anino M. Prašivková. La 21-an de februaro aranĝita ekspozicio de korespondaĵoj kaj parolado de s-ano Miloš Rudolf, sekretario de TKKE.

ČESKÉ BUDĚJOVICE:

La gejunuloj el la urbo kun esperantistoj el Netolice preparas sin por laboro en SET, okazonta ĉijare en Ŝumavio. S-ano prof. Wurm gvidas kurson por gestudentoj kaj estas espero, ke ili enviciĝos en la Junulara movado. Ĉiuj jam estas anoj de la klubo kaj intencas viziti SET 1957.

DOKSY:

Rondeto vigle laboras. La 22-an ĝi organizis publikan prelegon kun filmoj de s-ano Josef Vítek pri Norvegujo. Bona sukceso propaganda.

DUBÁ:

loka rondeto aranĝis la 19-an de aprilo publikan prelegon de s-ano Jos. Vítek kun kolorfilmoj pri Svedlando.

FRÝDEK-MÍSTEK:

publikan memorgesperon kun serioza programo vizitis pli ol 400 vizitintoj. – La 7-an de aprilo regula regiona laborkunveno de rondetoj el regionoj Ostrava kaj Olomouc. 39 delegitoj el 15 lokoj. Ĉefreferanto Vladimír Slaný, per raportoj pri aktualaj temoj kontribuis Draž. Kočvara kaj Frant. Lička. Elektitaj du lingvo-observantoj. Plensukcesa konferenco.

HRADEC KRÁLOVÉ:

Amuzvesperon la 23.3.1957 partoprenis 120 personoj, tre kontentaj kun la programo. Laborkonferenco la 24.3.1957 kunigis 90 delegitojn el regionoj Hradec Králové (33), Praha (16), Pardubice (10), Ostrava (10), Olomouc (8), Liberec (8), Plzeň (3), Brno (1), Ústí n. Lab. (1), entute el 39 lokoj. Ĉefreferaton pri la enlanda kaj tutmonda movado prezentis J. Vítek. Al la programo de la konferenco kontribuis s-anoj Hromada, Šustr, Kožený kaj ceteraj. Modela konferenco alportis gravan silon por nia movado. Rezolucio substrekas plenan subtenon de klopodoj de TKKE kaj streĉon de forte por la tutmonda paco.

La 8-an de majo ekskurso kun nekonata celo. En Česká Skalice faritaj preparuj por restarigi la grupon. Por septembro preparata en Hradec ekspozicio pri Esperanto okaze de la 50jara ekzisto de la Klubo. Ambaŭ delegitoj por la Festivalo instruataj en Esperanto.

JAKARTOVICE:

Aranĝata kurso por 10 infanoj kaj 5 plenkreskuloj. Gvidas s-ano Hadámek.

JEVIŠOVICE:

EK Znojmo en kunlaboro kun E-rondeto en JEvišovice aranĝas la 15-an kaj 16-an de junio en Malnova kastelo en Jevišovice apud Znojmo sian unuan komunan laborkonferencon de esperantistoj de Sudmoravio. Sabatvespere konatiĝa vespero, dimanĉe grava primovada programo. Ĉiu, kiu povas, subtenu per sia partopreno la konferencon. Aliĝojn sendu al Klubo Esperantista ĉe Domo de Kulturo en Znojmo.

JIHLAVA:

La direktorko de la Kulturdomo por subteni lokan movadon (kiu estas sufiĉe forta) esprimas bonvolon elsendi kaj pagi elspezojn por kvin kursoj en Doksy!!!

Esperantista Klubo en Jihlava petas ricevi „Kulturajn kalendarojn“ eldonatajn monate de ĉiu regiona kulturdomo, se en ilia enhavo estas io ajn pri E. Materialo bezonata por la ekspozicio.

KARLOVY VARY:

Regiona Kulturdomo per speciala presita prospekto kun riĉa enhavo kaj aliĝilo propagandas novan kurson de Esperanto. Gratulinda ago! La prelegoj de Josef Vítek: la 12.6. pri Finnlando, la 19.6. pri Danlando kaj Gronlando.

KLATOVY:

Fondita grupo ĉe OB. Unuan kunvenon la 9. 8. 1956 partoprenis 6 personoj.

LIBEREC:

EK en kunlaboro kun Vlastivědný kroužek aranĝis prelegon de s-ano J. Vítek pri Svedujo. Bonege vizitita prelego, granda sukceso. La 26-an de Majo ekskurson en Ĉeĥan paradizon partoprenis 37 esperantistoj el 11 lokoj.

Regulaj kunvenoj en propra bela klubejo en Parko de kulturo ĉiumerkrede. Klubaj programoj presataj en programkajero de MNV. Propra informilo NIA VOJO.

LITVÍNŮV:

La grupo kunvenadas merkrede (19-a horo) en uzinklubejo de Stalinovy závody. Perfektiga kurso.

MOST:

La 15-an de Majo bone vizitita prelego de J. Vítek pri Finnlando en Rudolice. Kursojn en Most kaj en Rudolice gvidas s-ano J. Uhlík.

NOVÉ ZÁMKY:

Elektita komitato por refondi Esp. Rondon Amikan (ERA) kaj renovigi la movadon en Sudslovakio. La komitato kunvenadas ĉiumarde kun ceteraj interesuloj. La komitato petas ĉiujn individuajn esp-istojn el suda Slovakio sciigi sian adreson al s-ano Viktor Badin, Jesenského 20, Nové Zámky.

La 12.4. soleno je la 40. datreveno de morto de Majstro. Festparolado: V. Badin, deklamis s-ano Geleta. En la hungara mezlernejo komnciĝis kurso por 6 gelernantoj laŭ skribaj lecionoj de A. Csáder. Instruas prof. Geleta E.

ODRY:

Fondita E-rondeto ĉe uzina klubo de Optimit (25 membroj, gvidas Frant. Potoček). Vespera kurso kun 12 interesuloj.

OLOMOUC:

Vigla laboro ĉe ĉiuj lokaj rondetoj, kiuj komune la 8.3. aranĝis prelegon kun originalaj diafilmoj pri HIROŜIMA. Dum la Popoluniversitato de EK Praha prelegis s-anoj Rudolf kaj Dro Mohapl.

OSTRAVA:

Tre vigla laboro ĉe ĉiuj rondetoj (Junularo VŽKG, Tramistoj, Hulváky, Zábřeh, Hrabůvka, Vítkovice, Poruba, Havířov). En Havířov bonega reg. kunveno (10.3.) kun partopreno de 70 personoj. Kursoj por plenkreskuloj kaj infanoj en ĉiuj respektivaj lokoj.

PARDUBICE:

La rondeto ŝanĝis sian patronon. Ĝi nun estas Osvětová Beseda, kiu ĉiujaŭde disponigas al la rondeto du ĉambrojn por la vesp. kunvenoj.

PÍSEK:

2. 4. finita kurso por komencantoj. 28. 4. la grupo vizitis esperantistojn en Strakonice.

PLZEŇ:

Malgraŭ malfavora situacio la movado vekigás. Kunvenoj denove regulaj. Aranĝita komuna ekskurso al kastelruino Buben.

PODĚBRADY:

Fondita esp. rondeto de la junularo sub ČSM-grupo de dekonujara lernejo. Regulaj kunvenoj merkrede. 11 anojn en kurso gvidas Hana Seketová. Publika kurso por komencantoj kun 20 personoj. Por la 30-a de junio preparata laborkunveno de E-junularo.

PŘEROV:

Klubo vigle kaj prospere laboras. Kurso por 25 komencantoj en uzina klubejo de Přerovský pivovar. Kurson por progresintoj vizitas 15 personoj. La rondeton kaj ambaŭ kursojn gvidas oferta Rich. Júrka. Nova E-rondeto fondita ĉe uzina klubo de Přerovské strojírny. Ĝin gvidas s-ano Vymětal.

SADSKÁ:

Kurso kun 16 metilernantoj en metilernejo ek de 8. 4. 1957. Gvidas laŭ perfekta instruplano s-ano Josef Chvosta el Poděbrady.

TRENČÍN:

Korpekzerca unuiĝo TTS eldonis propagandcelan grandformatan dupaĝan informilon kun sep fotobildoj NIA SPEGULO, kiu enhavas ankaŭ mencion pri 65-jariĝo de s-ano Ján Valaštan Dolinský. Esperantan tekston kaj eldonon prizorgis s-ano Ján Lamačka.

TŘEBÍČ:

Ek de pasintjara oktobro du kursoj: la kurson por komencantoj vizitas 8 gelern. (gvidas B. Daňhelová), tiun por 12 progresintoj gvidas Th. Kilian. Ĉiudimanĉe laborkunveno kiun vizitas meznombro 8 p. En la pasinta jaro kunvenis la klubo (kunvenoj, kursoj kaj aliaj aranĝoj) 111-foje, partopreno entute 1090 gesamideanoj.

TŘINEC:

La rondeto aranĝas en la tagoj: 10.-16.-an de junio seminarion, kiu kulminas la 16-an de junio per TRADICIA ESKURSO AL ĈANTORIA (laborkonferenco de regionoj Ostrava kaj Olomouc). PROMESITA PARTOPRENO DE PLI OL 100 POLLANDAJ GEEESPERANTISTOJ (du aŭtobusoj el Krakovo ktp.) Eluzu tiun ĉi unikaj okazintaĵon por amasa ĉs.-pola renkontiĝo per amasa partopreno!

ŽĎÁR NAD SÁZAVOU.

La rondeto aranĝis belsukcesan prelegon pri Finnlando de s-ano Josef Víték (350 ĉeestantoj), la 14.5.1957. Vigla fruktodona laboro, kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Pluraj aliĝintoj por SET.

ŽILINA:

Honore al la Majstro en aprilo aranĝita priesp. ekspozicio, malfermita biblioteko. Nova kurso por komencantoj. Kunvenoj de la rondeto ĉe Regiona Kulturdomo ĉiumerkrede je la 18-horo en la Kulturdomo.

ABONANTOJ DE „PACO“ ATENTU!

La Bulgara MEM-sekcio, kvankam ĝi ĝustatempe transdonis la manuskriptojn por la aprila „PACO“, kiu eldoniĝas en Bulgario, al la presejo, ĝi malgraŭ tio nur povas esti distribuata al eksterlandaj abonantoj en fino de majo. Diversaj ofic. traktadoj, kiel preskontrolo kaj prespermeso multe prokrastigis la ĝustatempan eldonon. Ĉar ni unuafoje prezentas al vi presitan eldonon kun aldonaj krompaĝoj, ni ne sperte tiujn formalajojn pli frue. Ni do sincere petas ĉiujn „PACO“ – legantojn, bv. esti paciencaj kaj senkulpigu nin.

Por la Bulgara MEM-sekcio: Prof. Canko MURGIN

LA REDAKCIO ANONCAS:

En venonta numero aperos pli ol cent kvinde korespondadreso, kiujn pro amplekso ni ne povis publikigi en la nuna numero. La eldono de tiu ĉi numero prokrastiĝis pure pro la troa okupiteco de la redaktanto, kiu pretigas la Bultenon kiel sian kromlaboron. Bv. pardoni tiun ĉi fakton!

BULTENO, informilo de Esperantista klubo ĉe OB2 en Praha, aperas laŭbezone.

Respondeca redaktoro: Josef Víték, Jungmannova 24, PRAHA II, tel. 238323.

Prezidanto de la Klubo: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, PRAHA I, tel. 634 64

MOST:

La 15-an de Majo bone vizitita prelego de J. Víték pri Finnlando en Rudolice. Kursojn en Most kaj en Rudolice gvidas s-ano J. Uhlík.

NOVÉ ZÁMKY:

Elektita komitato por refondi Esp. Rondon Amikan (ERA) kaj renovigi la movadon en Sudslovakio. La komitato kunvenadas ĉiumarde kun ceteraj interesuloj. La komitato petas ĉiujn individuajn esp-istojn el suda Slovakio sciigi sian adreson al s-ano Viktor Badin, Jesenského 20, Nové Zámky.

La 12.4. soleno je la 40. datreveno de morto de Majstro. Festparolado: V. Badin, deklamis s-ano Geleta. En la hungara mezlernejo komnciĝis kurso por 6 gelernantoj laŭ skribaj lecionoj de A. Csáder. Instruas prof. Geleta E.

ODRY:

Fondita E-rondeto ĉe uzina klubo de Optimit (25 membroj, gvidas Frant. Potoček). Vespera kurso kun 12 interesuloj.

OLOMOUC:

Vigla laboro ĉe ĉiuj lokaj rondetoj, kiuj komune la 8.3. aranĝis prelegon kun originalaj diafilmoj pri HIROŜIMA. Dum la Popoluniversitato de EK Praha prelegis s-anoj Rudolf kaj Dro Mohapl.